45 Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista
(63) - Novembro/Decembro 1982 3 FF

Unujara abono kun adresaro : 18 FF al la poŝtkonto n° 3 371 74M BORDEAUX de la eldonanto :

ISSN 0150-5823

# laŭte!

Cercle espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT

## KIE LA UTOPIO ?(*)

Oni ja bone konas la kutiman obĵeton de la defendantoj de l' establita ordo kontraŭ tiuj, kiuj ĝin kontestas : "Malrealismo, utopio!". Eluzita argumento, sed kiu ankoraŭ konfuzas la mensojn.

Ni diras, ke la akuzo pri malrealismo estas returnenda al tiuj, kiuj ĝin eldiras. Ni metas la demandon : "Kie do kuŝas la utopio ?" Ĉu flanke de la homoj, kiuj volas ŝanĝi la organizon de la socio kaj produktado tial, ĉar ili vidas ĝin la funda kaŭzo de la malbonoj suferataj de la homaro, aŭ ĉu flanke de tiuj, kiuj asertas, ke la profitcela societo estas ankoraŭ la plej bone adaptita al la kontentigo de niaj bezonoj ?

Unue ni diru, ke tiu establita ordo - fakte, la establita malordo - ne de ĉiam ekzistas. La profitcela socio estas la unua en la Historio, kiu senbridigis avidecon kaj rivalecon inter la individuoj. Ke ĝi havis stimulajn kaj utilajn efikojn, se ĝin konsideri laŭ mallonga periodo

--------

*Eltiro el la franclingva revuo "La grande relève des hommes par la Science" -(La granda anstataŭigo de la homoj per la Scienco) Kapartikolo de Jean MALRIEU en n-ro 798, marto 1982.

kaj vidpunkto de la privilegiaj minoritatoj, pri tio ĉi ni tute konsentas. Sed la anarkia disvolviĝo, kiun ĝi induktadis nuntempe, ĵus atingis sojlon de kie la rezultoj de l'ekonomia aktiveco ekinversiĝas. De nun, la negativaj efikoj de la produktado superas la pozitivajn, kaj same la sociaj kostoj superas la individuajn enspezojn, la malutilaĵoj la utilaĵojn.

Ĉi inversiĝon de la tendenco esprimas la nuna krizo, kiu estas multe pli ol iu konjunktura krizo tia, kian jam spertis la profitcela ekonomio en la pasinteco, senelira krizo, kontraŭe al la asertoj de la dungopagitaj aŭguristoj kaj ĉiaspecaj politikistoj.

Ĝis la komenco de la jaroj 70-aj, la fuĝo antaŭen de la produktado kaj konsumado, iu kvazaŭ senlima ekspansio ŝajnis garantii la regulan funkciadon de la monda merkato. Trompa prospero, fondita sur freneza malŝparo de la naturaj riĉaĵoj, ekspluatado de la neevoluintaj landoj, manipulado de la faktoroj en la interŝanĝoj. Ĉe la dominantaj ŝtatoj, profitantoj de tiu planedskala rabekspluatado, - la t.n. "racket", supera stadio de la Kapitalismo - la formado de unu grandega klaso de parazituloj, ade kontribuis al la stabiligo de la societo industria.

La energi-krizo de la jaroj 70-aj, antaŭ-anonco de la ĝenerala krizo koncerne la krudmaterialojn, la internaciigo de la merkato kaj kapitalo, la reekvilibrigo de la faktoroj en la interŝanĝoj, la pligrandiĝo de la kostoj en la produktado, la informadik-devenaj novigaĵoj, jen tiom da faktoroj novaj, kiuj jam eksonoras pri la morto de la sistemo.

La instituciaj procezoj, starigitaj jam de duona jarcento por malbloki la ekonomian maŝinon, hodiaŭ sin montras senefikaj kaj kontraŭdiraj. Kion oni profitas sur la kampo de aktiveco, tion oni perdas sur la kampo financa. La emisio de monrimedoj destinataj kompensi la strukturan nesufiĉon de la bezonoj tradukiĝas per prezinflacio, kiu mem nuligas la relanĉon.

La politikoj pri financa bridado, el mona tipo, ne donas pli bonajn rezultojn. Koncerne la investojn en la t.n. "alsupraj" teknologioj, ili plibonigas la konkurkapablon de l'entreprenoj nur malprofite al la dungebleco. Entute, la sukcesoj kaj profitoj registritaj ĉe iu partnero aŭ sektoro respondas al retroiro kaj perdoj ĉe la ceteraj.

(daŭrigo p.42)

SVISIO
- Schmutz Hermann, Feldstr.24, 4123 ALLSCHWIL

*********************************************

Adresojn en popoldemokratioj ni mencias nur se la tieaj abonantoj tion deziras.

*********************************************

MODIFOJ AL LA BROŜURLISTO

| | |
|---|---|
| Argentina Novelaro, plena kolekto, 18 noveloj en unu volumo | AR. 15 |
| Argentina Novelaro, unua kolekto | AR1. 5 |
| Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio? | ĈS. 6 |
| Elekto de tekstoj de Bakunin (anstataŭas: "La libereco" LL) | EL. 10 |
| Nia Individuismo (E Armand) | NI. 4 |
| Notre Individualisme (la sama en la fr.) | NIf.4 |
| Les Seize règles de l'espéranto commentées par un espérantiste français | SR. 2 |
| Dictionnaire de poche (vidu : AERA Libroservo, p.34 de Laŭte! n-ro 45) | |

Specialaj ofertoj :

| | |
|---|---|
| Verkaro de E.Lanti(ĈS,LE,VL1,VL2,VO) | VEL. 45 |
| Verkaro de Valo (KI,KF,SJ,MM,PL) | VDV. 30 |
| Verkaro de Han Riner (AA,IA,IM,KE,MC,VI) | VHR50 |

Abonantoj de "Laŭte!" ĝuas 20%rabaton kaj senpagan sendon por mendoj superaj al 60 FF. (escepte de la specialaj ofertoj,kompreneble)

SUPLEMENTO
al la
ADRESARO 1982

Forigi

FRANCIO : 31240 (Savaric), 48500 (Sarrut), 59130 (Thumerelle), 60000 (Masson)

Modifi

FRANCIO, 94260, 10,allée de la Résidence

Aldoni

AUSTRALIO
- Couch Jim, Jura Books, 417 King Street, NEWTOWN, Sydney 2042
- Koppel H., 41 Byfield St., RESERVOIR 3073 Vic.
- Kanaĉki S.,72 Jubilee St.,MOUNT WAVERLEY, 3149 Vic.
- Leereveld M.,Heathe Grove, BELGRAVE SOUT. 3160 Vic.
+ Lehane J., 2-A Harms St., TOOWOOMBA, 4350
- Smeets R., 70 Fairfield St., MT HAWTHORN, 6016 W.A.

SUPLEMENTO
al la
ADRESARO 1982

---

Forigi

---

FRANCIO : 31240 (Savaric), 48500 (Sarrut), 59130 (Thumerelle), 60000 (Masson)

---

Modifi

---

FRANCIO, 94260, 10,allée de la Résidence

---

Aldoni

---

AUSTRALIO
- Couch Jim, Jura Books, 417 King Street, NEWTOWN, Sydney 2042
- Koppel H., 41 Byfield St., RESERVOIR 3073 Vic.
- Kanaĉki S.,72 Jubilee St.,MOUNT WAVERLEY, 3149 Vic.
- Leereveld M.,Heathe Grove, BELGRAVE SOUT. 3160 Vic.

\+ Lehane J., 2-A Harms St., TOOWOOMBA, 4350
- Smeets R., 70 Fairfield St., MT HAWTHORN, 6016 W.A.

BELGIO
- Thumerelle J.C.,place de la Station 16 7790 WARNETON

BRITIO
- Clements Ralph V.,41 Brabourne Crescent, BEXLEYHEATH, Kent, DA7 5QJ
- Danson Frank C., 7 Infield Park, BARROW-IN-FURNESS, Cumbria, LA13 9JL

FINNLANDO
- Oiva Vehmas, Kuoppamäentie 40C/19 SF-33800 TAMPERE 80

FRANCIO
- Calamy Jean, 38 Les Nègles,13420 GEMENOS

\+ Moure G., Verclauze, 26510 REMUZAT

\+ Gaubert L.,13 r.L.Castelbou,31000 TOULOUSE
- Robin E.,rés.Le Derby, 33320 EYSINES.
- Brunel P.,Rossigné,Les Aires,34600 BEDARIEUX

\+ Proud'hom Irma, 114 rue de l'Aniel, Maraussan, 34370 CAZOULS LES BEZIERS

\+ Cortes H.,12 r.J.Callot, 44100 NANTES
- Vince F., r.Dr Bichat, "Hejme", 44600 ST NAZAIRE
- Sarrut R.,8 r.du Pontet,48200 ST CHELY D'A.
- Lehalle Alain, 7 a.Pré à Fey, 57420 VERNY

\+ Chialvo Colette, Poste principale, 64700 HENDAYE
- Gérard Ch.,4 r.Dr. Rives, 66000 PERPIGNAN
- Masson Michel, 126 La Chapelle le Bonhomme 68650 LAPOUTROIE
- Poupeau Yvon, 611 quartier Galilée, 77190 DAMMARIE LES LYS. t:(6)439 48 50 (50,desegnisto), ŝ: ŝako, ontologio.

GERMANIO (OKCIDENTA)
- Kersting Karl-Heinz, Bredowstr.3, 4300 ESSEN 1

\+ Lindner Helga, 40 Lerchenstr.,4900 HERFORD

HISPANIO
- Castaño Vallina F., C.Magnus Blikstad n°17-4°J, GIJON

HUNGARIO (3 adresoj)

ITALIO

\+ Marchioni Gisella,Via A.Costa 16, 21013 GALLARATE (VA)

JAPANIO
- Matumoto Kiyosi, Kikusuityo 5-tyome 1-13 Hyogo-ku, Kobe-si (652)

JUGOSLAVIO
- Tone Logar, Trubarjeva 31, 61000 LJUBLJANA

NEDERLANDO
- Derks W.,Limbrichterstraat 60, 6131 EE SITTARD

\+ de Bruin Inge, Doniastate 9, 7608 XJ ALMELO

NORVEGIO

x Legros C. kaj Anda R., Kverme II BRUSAND 4363, boks 113

POLLANDO
- Stykowski Czestaw, 67400 WSCHOWA. PO.Box90 (43,gvid.de la loka E-klubo) ŝ: sakoj, go, ludoj, PM kaj bk.

SVISIO
- Schmutz Hermann, Feldstr.24, 4123 ALLSCHWIL

*******************************************

Adresojn en popoldemokratioj ni mencias nur se la tieaj abonantoj tion deziras.

*******************************************

MODIFOJ AL LA BROŜURLISTO

---

Argentina Novelaro, plena kolekto, 18 noveloj en unu volumo AR. 15
Argentina Novelaro, unua kolekto AR1. 5
Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio? ĈS. 6
Elekto de tekstoj de Bakunin EL. 10
(anstataŭas: "La libereco" LL)
Nia Individuismo (E Armand) NI. 4
Notre Individualisme (la sama en la fr.)NIf.4
Les Seize règles de l'espéranto commentées par un espérantiste français SR. 2
Dictionnaire de poche (vidu : AERA Libroservo, p.34 de Laŭte! n-ro 45)

<u>Specialaj ofertoj</u> :
Verkaro de E.Lanti(ĈS,LE,VL1,VL2,VO) VEL. 45
Verkaro de Valo (KI,KF,SJ,MM,PL) VDV. 30
Verkaro de Han Riner (AA,IA,IM,KE,MC,VI) VHR50
Abonantoj de "Laŭte!" ĝuas 20%rabaton kaj senpagan sendon por mendoj superaj al 60 FF.
(escepte de la specialaj ofertoj,komprenenble)

BELGIO
- Thumerelle J.C.,place de la Station 16
  7790 WARNETON
BRITIO
- Clements Ralph V.,41 Brabourne Crescent,
  BEXLEYHEATH, Kent, DA7 5QJ
- Danson Frank C., 7 Infield Park,
  BARROW-IN-FURNESS, Cumbria, LA13 9JL
FINNLANDO
- Oiva Vehmas, Kuoppamäentie 40C/19
  SF-33800 TAMPERE 80
FRANCIO
- Calamy Jean, 38 Les Nègles,13420 GEMENOS
+ Moure G., Verclauze, 26510 REMUZAT
+ Gaubert L.,13 r.L.Castelbou,31000 TOULOUSE
- Robin E.,rés.Le Derby, 33320 EYSINES.
- Brunel P.,Rossigné,Les Aires,34600 BEDARIEUX
+ Proud'hom Irma, 114 rue de l'Aniel,
  Maraussan, 34370 CAZOULS LES BEZIERS
+ Cortes H.,12 r.J.Callot, 44100 NANTES
- Vince F., r.Dr Bichat, "Hejme",
  44600 ST NAZAIRE
- Sarrut R.,8 r.du Pontet,48200 ST CHELY D'A.
- Lehalle Alain, 7 a.Pré à Fey, 57420 VERNY
+ Chialvo Colette, Poste principale,
  64700 HENDAYE
- Gérard Ch.,4 r.Dr. Rives, 66000 PERPIGNAN
- Masson Michel, 126 La Chapelle le Bonhomme
  68650 LAPOUTROIE
- Poupeau Yvon, 611 quartier Galilée,
  77190 DAMMARIE LES LYS. t:(6)439 48 50
  (50,desegnisto), ŝ: ŝako, ontologio.
GERMANIO (OKCIDENTA)
- Kersting Karl-Heinz, Bredowstr.3,
  4300 ESSEN 1
+ Lindner Helga, 40 Lerchenstr.,4900 HERFORD
HISPANIO
- Castaño Vallina F., C.Magnus Blikstad
  nº17-4ºJ, GIJON
HUNGARIO (3 adresoj)
ITALIO
+ Marchioni Gisella,Via A.Costa 16,
  21013 GALLARATE (VA)
JAPANIO
- Matumoto Kiyosi, Kikusuityo 5-tyome 1-13
  Hyogo-ku, Kobe-si (652)
JUGOSLAVIO
- Tone Logar, Trubarjeva 31, 61000 LJUBLJANA
NEDERLANDO
- Derks W.,Limbrichterstraat 60,
  6131 EE SITTARD
+ de Bruin Inge, Doniastate 9,
  7608 XJ ALMELO
NORVEGIO
x Legros C. kaj Anda R., Kverme II
  BRUSAND 4363, boks 113
POLLANDO
- Stykowski Czestaw, 67400 WSCHOWA. PO.Box90
  (43,gvid.de la loka E-klubo) ŝ: sakoj, go,
  ludoj, PM kaj bk.

# NIA DEBATO :

# nacio



Jakelino enkondukas :

Sennaciistoj estas homoj, kiuj deziras la formorton de ĉiuj nacioj. Jes ja, sed kio estas nacio ? Ni malfermu PIV :

1. Popolo, akirinta konscion pri si mem kiel aparta socia komunaĵo kun distingaj trajtoj, ŝuldataj plejofte al komuneco de lingvo, kutimoj, tradicioj, religio, vivmaniero, ekonomiaj interesoj, politikaj idealoj aŭ aspiroj.
   Ekzemplo : nacio, batalanta por kreo de sia propra ŝtato.
2. Jura persono, konsistanta el la tuto de la individuoj regataj de unu sama konstitucio, kaj distingita disde ili.
   Ekzemplo : suvereneco fontas el la nacio.
3. Ŝtato, regno.

Sed la embaraso estas, ke malfacilas trovi sur la mondatlaso ion, kio respondas al la tri difinoj samtempe.
Kroatio estas nacio laŭ la difinoj 1 kaj 2, sed ne laŭ la difino 3.
Jugoslavio estas nacio laŭ la difino 3, sed ne laŭ la difino 1.
La plimulto de la afrikaj ŝtatoj estas nacioj laŭ difino 3, sed ne laŭ difino 1.
Usona ŝtato kutime estas nacio laŭ difino 2, sed ne laŭ difinoj 1 kaj 3 : ĝi havas proprajn leĝojn (ekzemple, en iuj ŝtatoj ekzistas mortpuno, en aliaj ne), sed ne posedas suverenecon, kaj plejofte estis kreita tute artefarite. Estas tamen esceptoj :

ekzemple, Teksaso estas nacio laŭ la difino 1. Kelkfoje la problemo estas tre tikla politika problemo. Antaŭ nelonge, bretonaj junuloj estis kondamnitaj pro rifuzo soldatservi en la franca armeo. Ilia argumento estis, ke Bretonio estas nacio ne nur laŭ difino 1, sed ankaŭ laŭ difino 2 : antaŭ la Franca Revolucio, la suvereneco de teritorio ne dependis de la tie vivanta popolo, sed de la monarko. Pro la edziniĝo de dukino Anna al la reĝo de Francio, kaj poste de ŝia filino Klaŭdia de Francio kun reĝo Francisko la Unua de Francio, la reĝo de Francio estis la sama persono, kiel la duko de Bretonio. Sed el tio ne rezultis, ke kunfandiĝis ambaŭ nacioj. En 1793, tranĉante la kapon de la reĝo de Francio, oni samtempe senkapigis la dukon de Bretonio. Sekve de tio, kiu estas suvereno de la bretona duklando ? La problemo ankoraŭ ne estas jure solvita.

Alia ekzemplo : la Federacia Respubliko Germanio estas nacio nur laŭ difino 3 : okulfrapas, ke la limoj de ĝia teritorio rezultas nur el historia hazardo. Sed ĝi volas esti nacio ankaŭ laŭ difino 1 : ĝi konsideras sin reprezentanto de la tuta germana nacio, kaj ĉiu germano estas teorie civitano de FRG. Mi konis rumanian civitaninon, kiu fuĝis de Rumanio al FRG. Ŝi tie ricevis legitimaĵon, ne de politika rifuĝinto, sed de civitanino de FRG, ĉar ŝia origino estas germana. Kompreneble, neniam GDR konsentos, ke ĝiaj civitanoj estas civitanoj de FRG. Ĝi solvis alie la problemon : ĝi forigis el sia konstitucio la referencon al la germana nacio. GDR estas la "socialista patrolando" de la GDRaj civitanoj.

Ĉar ekzistas pluraj difinoj de la nacio, ekzistas ankaŭ pluraj konceptoj pri sennaciismo. Iam en la sama numero de "Sennaciulo" oni povis legi du ekzakte malajn kontribuojn de du kamaradoj, kiuj ambaŭ estis sennaciistoj :
- k-do Valo (kiu estas okcitano) opiniis, ke oni devas solidariĝi al la etnoj luktantaj kontraŭ la ŝtatoj ;
- k-do Orliange male opiniis, ke etnoj devas malaperi por plifortigi la ŝtatojn.

Kiel "racie elpensita lingvo" povas uzi la saman vorton por nomi du kontraŭbatalantajn aferojn ? Nu, la respondon donas la ekzemplo, kiun la verkintoj de PIV elektis por la difino 2 : suvereneco fontas el la nacio. Tio



estas la bazo de la franca juro ekde la franca Revolucio. Kiel klare montras la flago de la franca respubliko, la Franca Revolucio estis pariza : la blanka koloro estas tiu de la reĝo, la ruĝa kaj la blua la koloroj de la pariza urbo. La flago signifas, ke la parizanoj de nun kontrolas la reĝon (tiutempe la revoluciuloj deziris nur konstitucian monarkion). Tiom longe, kiom vivis la reĝo, la problemo ne metiĝis, ĉar eĉ kun konstitucio oni povis bazi la suverenecon sur la fizika persono de la reĝo. Tiel faras la britoj : angloj, kimroj kaj skotoj havas la saman reĝinon, malgraŭ ke ili estas malsamaj nacioj. Sed ekde kiam la reĝo estas mortinta, necesas trovi alian bazon por la juro. La parizanoj decidis, ke la nacio estas suverena. Sed la reĝo de Francio estis estro, ne nur de la parizanoj, sed de pluraj aliaj nacioj. Ĉu lia morto devus rezultigi la dispartiĝon de la nacioj, kiujn li regis ? La parizanoj solvis la problemon per konfuzo inter du malsamaj konceptoj : la civitaneco kaj la nacieco. Ili decidis, ke ĉiuj regitoj de la reĝo de nun apartenos al la franca nacio. Paroli bretone estis kontraŭrevolucia ago, kaj la elzacaninoj devis "rezigni pri siaj germanaj moroj, ĉar iliaj koroj estas francaj". En tiu tempo, la metodo por konvinki bretonon, ke li estas franco, estis la gilotino. Nun oni estas malpli severa. La junaj bretonoj, kiuj rifuzis soldatservon al la pariza nacio estis kondamnitaj nur al unu jaro da mallibero. Poste, bonega ilo por francigi la alinacianojn estis la laika lernejo. Tiu sinteno daŭras ankoraŭ nuntempe. Oni povas esti jugoslava civitano kun nacieco kroata. Sed oni ne povas esti franca civitano kun nacieco bretona. Sur la legitimaĵo de ĉiu franca civitano estas skribitaj la vortoj : nacieco : franca. Ĉiam en la franca lingvo estas konfuzataj tiuj du malsamaj konceptoj : nacieco kaj civitaneco. Tiun konfuzon franclingvanoj kutimas apliki ankaŭ al aliaj popoloj : ili nomas holandano ĉiun nederlandanon, eĉ se li estas zelandano, ruso ĉiun sovetan civitanon, eĉ se li estas ukrajnano, anglo ĉiun briton, eĉ se li estas skoto, ktp.

Kiam oni scias, ke la sidejo de SAT estas en Parizo, ke la verkintoj de PIV estas francoj, ke la fondinto

de SAT estis franco, oni pli bone komprenas tiun malraciaĵon nomi malsamajn aferojn per unu vorto. Laŭ mia kompreno, la tuta sennaciismo baziĝas sur francismo enkondukita en Esperanton.

Regas grandaj konfuzoj en la verkoj de Lanti :

- konfuzo inter nacio kaj ŝtato. Lanti ne povas koncepti ke homoj konsciaj pri sia nacia aparteno povas ne lukti por havi sian ŝtaton (tion montras la ekzemplo elektita por ilustri la difinon 1). Nu, nuntempe la elzacaj etnistoj neniel volas krei elzacan ŝtaton, kaj neniu imagis esti ambasadoro de Elzaco en Meksikio. Kantgrupo "La Manivelle", kiu provas konsciigi la elzacanojn pri ties nacieco, kantis ĝis nun en la elzaca, la franca kaj la germana. Nun ĝi aldonis al sia repertuaro kanton en itala lingvo, kiu tekstas : "Mia patrolando estas la tuta tero, mia leĝo la libereco". Mondcivitaneco kaj etnismo ne kontraŭas unu la alian : por esti mondcivitano, necesas unue esti civitano de iu preciza loko en la mondo. Elzacaj kantistoj subtenas la rajton de la pola popolo vivi libere.
- konfuzo inter patrioto kaj naciisto. Jen la difinoj de PIV :
  patrioto : homo amanta sian patrujon kaj volonte servanta al ĝi.
  naciismo : politika doktrino, kun mistika bazo, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam preferinda kaj la naciaj ambicioj ĉiam pravaj kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio.
  Nu, mi estas patriotino, mi amas la francan kulturon. Veras, ke mia franceco venas de edukado kaj ne estas denaska, sed infaneto ne respondecas pri sia edukado, sekve mia franceco ne estas pli volita ol mia ineco. Oni ne povas diri al viro, ke por pli bone subteni la feminisman movadon li fariĝu virino. Same, kiam elzacanoj diris al mi, ke mi devus fariĝi elzaca, mi respondis, ke tio ne eblas. Sed mia amo al la franca patrujo ne estas prefero, kaj mi apogas la klopodojn de elzacanoj konservi sian kulturon. Mi pensas, ke mia nacio ĝis nun malprave traktis la elzacan nacion. Oni povas esti patrioto sen esti blinda.

Ĉar en PIV regas plej granda konfuzo pri la temo, mi ŝatus scii, kion la legantoj de "Laŭte!" nomas "nacio", kaj kiaj, laŭ ili, devas esti la rilatoj inter Esperanto kaj la naciaj kulturoj.

Jakelino.



Patriko :

Ĉu Bretonio estas nacio ?
Nur la politikistojn vere interesas la problemo...
Ja etnon konsistigas la bretonoj kun ties lingvo, kulturo, ekonomio, historio, klimato, ktp... kaj antaŭ kvar jarcentoj ŝtato (duka kaj reĝa).
Malgraŭ tio, neniam ekzistis konscio prinacia ĉe la bretona popolo. Ĉu honeste paroli pri senkonscio ?
Ĉu Francio estas nacio ?
Nur de la jaro 1789 komenciĝis la ekonomia, politika kaj lingva unuigo de tiu perforte farita lando. La franca lingvo estis tiu de la pariza kaj orleana regionoj - oni estas parolinta en ĉiuj eŭropaj kortegoj sed la francia gento komencis pronecese uzi ĝin nur de la du mondmilitoj.
Nacioj estas io juna en la homara historio (dekmiloj da jaroj). La problemo pri nacioj iĝis grava afero inter la esperantistoj, kies unu organizaĵo nomiĝis "sennacieca".
Ĉu la fondintoj de tiu asocio naive kredis, ke abolo de nacioj estas ŝlosilo por paco ?
Forpasis la mondmilitoj kaj eksplodis la naciliberiĝaj luktoj ĉie ajn en la mondo. Ĉu niaj sennaciistoj kondamnas ilin ?
Tion mi opinias, ke la debato pri sennacieco ekzistas nur interne de la esperantistaro ; oni kutime parolas pri naciismo aŭ male pri internaciismo sed kio pri sennaciismo ?
Estas maltrafe por E-asocio sin nomi sennacieca. Pli facile sin taksi sennaciulo ol senŝtatano, ĉar ŝtato ja estas reala, konkreta kaj totalisma aparato, kiu ordonas kaj ordigas al nia ĉiutaga vivo dum nacio estas kvazaŭ elekta afero...
Do la debato pri nacio iĝu debato pri ŝtato kaj ties rolo en la sociordo. Rilate la E-movadon kaj tutmondan organizadon ĝi estu tia : ĉu tutmonda superŝtato ? ĉu mondskala senŝtata federacio de individuoj-komunumoj-urboj-regionoj-etnoj-kontinentoj-planedo ?

Patriko.

Al tiu demando Ĵanseb respondas :

## Ne nacioj sed organizita Homaro.

Kio estas nacio ? Nun aĉa vorto : "naciisto", "ŝovinisto" ktp. Maldekstruloj preferas paroli pri popoloj - kiuj rajtas disponi pri si mem. Sed kiu garantias tiun rajton ? La popolo mem, kiam ĝi uzas perforton por akiri sendependecon.

Do popolo estas homgrupo uzinta perforton por esti sendependa kaj kiu sukcesis.

Do la tielnomata "rajto de popoloj disponi pri si mem" signifas la rajton uzi perforton por esti sendependa - kondiĉe ke oni sukcesu. Tio estas la rajto de la plej forta.

Sed estas homgrupoj, kiuj suferas pri dependeco, pri diskriminacio kaj malegaleco, nur ĉar ili estas subpremataj de imperiistaj ŝtatoj...
Certe. Sed tiuj samaj homgrupoj estas uzataj, fare de la Grandaj Potencoj, kiel peonoj en ŝakludo.

Kio difinas nacion ? aŭ popolon ? Ĉu lingvo ? Ĉu teritorio ? Natura riĉeco, kiun oni ne volas partigi ? Emo ne pagi impostojn ?

Respektinda estas la rajto de homgrupo paroli la bretonan lingvon, praktiki sian religion, havi siajn kutimojn. Sed ne instaligi sovetajn bazojn sur sia teritorio, nek ĉantaĝi pri nafto aŭ nutraj produktoj, nek polucii maron, pretekste ke la polucio okazas el sia "suverena" teritorio.

Devas esti unu teritorio : la Tero. Kaj la homaro devas esti organizata laŭ pluraj niveloj : militista, ekonomia, kultura, etna, ktp... por ke ĉiu problemo estu solvata plej proksime de tie, kie ĝi aperas.

Nova leĝaro devas aperi : Rajtoj kaj Devoj de la Homgrupoj rilate al Homaro, individuoj kaj aliaj homgrupoj. Inter ili, la rajto por ĉiuj homoj grupiĝi laŭvole, por vivi kiel ili deziras.
La diversecon de la naskiĝo devas anstataŭi la diverseco de la elekto. Tiel eblos por ĉiu homo elekti landon kies vivmaniero plej plaĉas al li. Tio eblos... ankaŭ kiam ĉiuj parolos la saman lingvon.

Ĵanseb.



Nicole :

## Rilatoj inter Esperanto kaj naciaj kulturoj.

Legi en vortaroj eĉ diversdevenaj, ne donas sufiĉe kontentigajn klarigojn pri signifo de vortoj al niaj intelektaj serĉadoj, cerbumadoj. Ĉar la vortoj vivas, evoluas laŭ la uzado, la kompreno de la personoj, laŭ la medio, la historia tempo ankaŭ.

Pro tio, ofte la diskutoj estas malfacilaj, la interkompreno bezonas de ĉiuj atentemon, toleremon, malfermon al la diroj de la aliaj. (Mi tion spertis en Hungario pri la vorto "kooperativo"). Sed estas necese koni la etimologian sencon de la vortoj kiel bazo en la diskutoj, de sia propra esprimo. Mi same opinias kiel Jakelino pri la vortoj "nacio" kaj "ŝtato", tro ofte oni misuzas ilin.
Al naci-ano aŭ etn-ano necesas bona konscio pri la propra kulturo, la propraj "radikoj", kaj sufiĉe da personeco por sin protekti kontraŭ la kulturaj imperiismoj, same de la ekonomiaj kiel de la politikaj. Influoj, interŝanĝoj tute konsciaj inter diversaj kulturoj estas fenomeno natura, fruktodona, eĉ necesa por evoluo.

Kiam inter pluraj personoj oni spertas uzi la saman komunikilon, ekzemple muzikon, eblas subtiligi sian propran sentemon, komprenemon, kaj pli precize ricevi, senti la mesaĝon de aliuloj.
Esperanto utilas kiel komunikilo, ĝi apartenas al ĉiuj, eĉ la plej diversaj nacioj povas lerni kaj uzi esperanton.

Sperta esperantisto ĝuste parolas kaj verkas, li bone "digestis" la lingvon por sin esprimi, tiamaniere ke ĉiuj povu lin kompreni. Uzi esperanton necesigas de ĉiuj uzantoj paŝojn, strebojn al sama celo : lernado, uzado de esperanto kiel komunikilo. Estas konverĝado, favora sinteno al interkompreno. E-isto ankaŭ ofte diskutas pri la influo, la rolo en la mensoj de la lingvoj, kutimas eĉ serĉas rilatojn, renkontadon kun esperantistoj el diversaj nacioj. Esperantistoj riĉigas la internacian lingvon. Ŝajnas, ke esperanto valoras pli ol nacia lingvo, ke ĝi

estas malfermo al aliaj esprimoj, ke ĝi donas amplekson al la propra kulturo, ebligas apartan sensivon al aliaj kulturoj.
Tiel, esperanto povas protekti la naciajn kulturojn sen neadi kaj intermiksi ilin.

Nicole

Jean-Claude :

Kiel aperis la nacioj ? Eble tiel : ĉar vivintaj sur grundoj kaj en klimatoj malsamaj, logike estas, ke la homoj malsamis. El tio sekvis diferencoj en la vivmaniero kaj kulturo. Al tio ni aldonu kontaktojn inter la diversaj kulturoj kaj migradojn pro diversaj kaŭzoj, komerco, naturaj katastrofoj, militoj, konkeroj, ribeloj, persekutoj. Tiel multiĝis la nacioj : estas natura fakto, ligita al la homeco.

Do, nacio estas homgrupo(j) vivanta(j) sur difinita teritorio, kaj akceptinta(j) vivi laŭ komunaj reguloj, sub morala, jura aŭtoritato. La rolo de tiu aŭtoritato estas zorgi, ke ĉiu respektu tiujn regulojn, kaj proponi novajn, se la cirkonstancoj tion postulas, kalkulante kun eventualaj diferencoj inter la grupoj vivantaj sub ĝia influo. Laŭ mi, juro devas esti ido de moralo, kvankam mi konscias pri la teruraj sekvoj, kiujn povas naski tiu fakto. Necesas do difini, kio estas - aŭ devus esti - moralo kaj ties ecojn. Mi vidas du ĉefajn : objektivan scion, kaj reciprokan respekton.

Se oni povas deziri, ke ĉiu rajtu elekti la landon, kie li vivos, eraro estas voli malaperon de la nacioj. Sed urĝas, ke la nacioj ŝanĝu sian pensmanieron : la problemoj fariĝis mondskalaj. Endus, ke ĉiu nacio rezignu iom da sia suvereneco al supera instanco kapabla mastri la terajn problemojn. La teknikaj rimedoj nun ekzistantaj tion ebligas, Esperanto estas unu el ili. Mankas nur la homa volo.

Jean-Claude



J G :

Estas konstatebla fakto, ke ĉie en la mondo oni ĉeestas la vekiĝon de etna aŭ nacia konscio : de Groenlando, kiu forlasis la Eŭropan Komunumon por manifesti sian oponon al Danio, ĝis la Indianoj de Brazilio, kiuj luktas por antaŭgardi siajn vivmanierojn kontraŭ la detruado de la Amazona arbaro, tra la lukto de Kurdoj, Armenianoj, Eŭskadianoj, Bretonoj, Okcitanoj, Korsikoj, ktp, uzantaj variajn rimedojn por veki la atenton de la ceteruloj pri iliaj problemoj.

Pri la fakto, ĉu tiuj popoloj estas etnoj aŭ nacioj, la opinioj varias laŭ la senco donata al tiuj vortoj : regiono de centralizema ŝtato, nacieco, demona vorto por multnombraj esperantistoj. Jakelino bone pritraktis la difinon de la vorto en la enkonduko.

Mi volas priatenti alian aspekton de la problemo : la kialojn de tiu historia fenomeno.
La fino de la koloniaj imperioj - precipe franca kaj brita - kiuj alirigis al sendependeco multnombrajn landojn en Afriko kaj Azio kaj konsciigis ilin pri iliaj apartecoj (kultura, lingva, ktp), sed la artefariteco de la koloniaj landlimoj kaj ankaŭ la hegemonio de plimultaj etnoj, kreis novajn problemojn (Biafrio, Saharo, Kabilio...). Tiu "malkoloniigo" povas klarigi la renaskiĝon de la nacia sento en la t.n. tria mondo. Estas, laŭ mi, alia kialo en Eŭropo kaj Suda Ameriko : la imperiismo de la Potencegoj Usono kaj Sovetio, kiuj trudis al la nacioj, kiuj situas en iliaj influ-zonoj, la ekonomian kaj kulturan superregadon. Tiu subpremado estigis reagojn (Kubo, Salvadoro, Eŭropa Komunumo fronte al la usona potenco) kaj ankaŭ defendon de la naciaj kulturoj kontraŭ la influo de usona kino, muziko... En la sovetia zono okazis ribelo kontraŭ la subpremo de etnaj malplimultoj (Kirgizoj, Tataroj, Judoj...) aŭ de naciaj kulturoj ĉe la satelitaj landoj. Tiuj ribeloj estis perforte dispremitaj.

Alia kialo : la progreso de la centralizismo (tio, kion oni nomas en Francio "Jakobenismo"), kiu donas al la naci-ŝtato pli kaj pli da povo, celante unuformigi la homojn kaj instituciojn (samaj loĝejoj, sama televido, ktp...) "La Respubliko unika kaj nedividebla", kiel oni diris dum la Franca Revolucio de 1789. Por atingi tiun celon oni uzis kaj uzas ĉiujn

rimedojn por detrui la malsimilaĵojn sed tiu elradikiga politiko estigis reagojn de la koncernataj malplimultoj : kulturajn fare de la kantistoj, verkistoj katalunaj, okcitanaj, bretonaj, ktp, sed ankaŭ politikajn fare de la movadoj por nacia liberigo. Kiel diris Paul Sérant en sia libro "La Francio de la Malplimultoj" : "La etna naciismo estas sendube unu el la aspektoj de la individua ribelo en mondo, kie la aŭtoritato de la ŝtato limuzurpas senĉese sur la malnovaj liberecoj".

Laŭ mia vidpunkto la nura solvo inter la necesa tutmondigo de la problemoj kaj la respekto al la apartecoj estas federaciisma strukturo de la individuo ĝis la universo.

Pro la fakto, ke ĝi estas ligita al neniu ŝtato aŭ imperiismo, Esperanto povus ludi rolon por la rilatoj inter la naciaj aŭ etnaj malplimultoj. Sur tiu vojo la laboro de la revuo "Etnismo" estas interesa. La esperantistoj ne plu povas nei aŭ ignori pri la problemo, historia fakto de nia epoko.

J. G.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Noto de la fuŝema red. : Dum kelkaj ĉenleteranoj pritraktis la temon proponitan de Jakelino, la du ĉipostaj, apartaj, kontribuoj estis rekte senditaj al la red. sekve de la neĝusta informo aperinta en la n° 43 (p.45), ke la venonta debattemo estos "Naciismo". La red. kompreneble kulpas la fuŝaĵon ! Hu !

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## PRI NACIISMO

La naciismo, la potenco, la suvereneco, la profito, la rasismo estas intime interligitaj ; ĉiu el ili estas fonto de malfeliĉoj por la homaro, i.a. : militoj, mizero, malamegoj. Tiuj malamegoj sperte regataj, nutrataj, ekzistis en la pasinteco kaj ho ve ! ekzistas ankoraŭ nun.

Tiel longe dum la naciismo ekzistos, la milito ŝvebos en la internaciaj rilatoj ; tio estas la natura ordo de tia situacio. Post mallonga tempo, la popoloj favore reagas al tre lerta nacia propagando. Ĉiam la popoloj juĝas la patriotismon akceptebla... eĉ nun, la patriota sento forigas ĉiujn malamikajn sentojn kaj ĉiujn politikajn tavolojn. Pro tre eta terpeco armeoj da homoj el la laborista klaso, ofte mizeruloj (Malvina, Libana militoj...) kapablas sin interbuĉi por la plej granda profito de siaj registoj. Plorinde !



La ĵus okazinta, okazanta militoj rivelas tion ĉisupre eĉ al nepripensema homo. Pluraj monatoj da milito estis necesaj por ekvidi ombron de pacmovado (1917) kaj malobeemo en la frontaj tranĉeoj (1917). Ne sufiĉas denunci la ĉirkaŭvagantan militon por malebligi ĝin, tiel longe dum la ekonomia kondiĉaro, kiu ĝin eksplodigus, ekzistos. Nur per federaciismo monda la popoloj malaperigos la militon, ktp. En sia koro la popolo malamegas la militon. Eble iuj legontoj opinios, ke mi devojiĝas, traktante pri militoj? Tute ne ! ĉar la tuto interplektiĝas.

(...) Multaj eksterlandaj gekamaradoj misdebatas pri sennaciismo, ĉar ili ne ĝuste komprenas tiun opinion ; ĉefe, ĉar ili ne travivis similajn historiajn okazintaĵojn, kiel la francoj, precipe. Italoj kaj hispanoj ĝenerale pli bone komprenas sennaciismon ol la nordanoj kaj aliaj.

Kiel mi skribis ĉi-supre : monda federaciismo (°) estas la nura solvo al plibonigo de la homaro. Do, nacio ne ekzistus. Konsekvence nek la aĉa naciismo.

Suzana.

(°)Temas pri homsocio regata de ĉiuj anoj, ne superregata de monda registaro. Tio estas, ke la regado fontas el la bazo de la monda popolo. Tia unuigo ne signifas, ke la diversaj etnoj forlasus siajn karakterojn.

°°°

## NACIISMO

Ĉar naciismo estas bazita sur nacioj, sufiĉas serĉi, ĉu nacioj estas interesa kaj utila (afero) aŭ ne.

Nu, laŭ mi, sensencaĵo estas nacio, ĉar ĝi havas fundamenton :

- nek geografian - Multaj ŝtatoj posedas teritorion tre foran de la ĉefa lando : Portugalio kun Makao, Britio kun Falklandaj insuloj, Francio kun Gvajano, ktp.

Kaj se okazas, ke la limoj estas kelkfoje videblaj geografie (kiam temas pri riverego, montaro, marbordo) ofte tute artefaritaj estas ili.

- nek pro la rasoj, kiuj loĝas en ĝi laŭ gena senco : miksitaj estis la popoloj dum la tuta historio, pro militoj, invadoj, kaj nun ankaŭ pro vojaĝoj kaj migrado. Ekzemple, la regiono, kie mi naskiĝis, Ĉarentio, estis invadita de sinsekve : romianoj, maŭroj, britianoj, kaj de germanianoj. Venis en ĝin dum militoj hispanianoj, italianoj, portugalianoj, polianoj, k.a. Plejmulte el ili edziĝis kun tieloĝantoj. Do, multaj "ĉarentianoj" certe estas parte, ĉu britaj, ĉu maŭraj, ĉu ambaŭ, ktp. Kaj ĉie jen la sama afero. Ne plu estas laŭrasaj nacioj.
- nek lingve - En Hispanio kaj Ĉilio estas la sama oficiala lingvo, jen tamen du apartaj landoj. Norda belgiano parolas malsaman lingvon ol suda samlandano, tamen ambaŭ ili estas anoj de la sama lando.
- nek vidpunkte de la problemoj - Neniu problemo estas solvebla laŭ nacia strukturo : nek malsatego, nek senlaboreco.... Polucio ankaŭ estas sen limoj. Veturilo en aeron disĵetante plumbon, detruas atmosferon de ĉiuj landoj. Kiam oni tranĉas la arbojn en iu lando (ekzemple en Amazonia arbaro), oni detruas oksigenon de la tuta mondo.

Nur historia estas la deveno de ĉiu lando, ĉu milita, ĉu ekonomia kiel la vendo de Alasko al Usono fare de Sovetio. Konsekvence, tute hazarda ĝi estas.
Vole-nevole fariĝis ni membroj de la homaro. Mi eĉ dirus de la tuta vivantaro, ĉar dependas ĉiuj ni de la vivo de la aliaj estaĵoj.

Pro tio, ni influu kiel eble plej malmulte sur la naturon. Limigante tro mondskalan pligrandiĝon de la popolo, kaj produktante nur kio estas necesa por nia vivo, profitante la progreson. Ĉio estas nun tro ligita inter si, ne plu havas sencon limoj. Cetere, miaopinie, ne forigo de la nacioj estas utopio, sed male ja la konservado de ili.

Johano-Luko.

°°°



## De sennaciismo al etnismo... kaj reciproke!

Mi estas la fuŝulo, kiu erare anoncis en "Laŭte!" debaton pri "Naciismo", dum fakte temis pri "Nacio". Kvankam tion mi ne faris intence, tio ne fontas el hazardo. Mi apartenas al tiu speco de esp-istoj, kiujn hirtigas la vorto "nacio", al kiu aŭtomate ili ligas la fian "naciismo"n. Ne ĉiuj legis Lanti, ne ĉiuj estas sennaciistoj, sed ĉiuj aspiras almenaŭ al senlandlima mondo.
Mi legis kaj plu legas kun ĝuo ĉion troveblan de Lanti. Dum jaroj mi - sennaciisto - ignoris la etnan problemon, ĝis iam, devante enkonduki debaton pri la temo "Regionismo", mi trudis al mi legadon de diversaj "regionistaj" aŭtoroj. Ĉu mi ne estis sufiĉe konvinkita sennaciisto, ĉu mi estis konscia aŭ nekonscia subfosanto de la asocio, kie plej svarmas la sennaciistoj ? Mi ne scias. De tiam mi ne plu same uzas la vorton "regionismo". De tiam mi opinias, ke etnismo ne nur povas kunekzisti kun strebado al tutmondismo, sed ke eĉ la sennaciismo de Lanti - se komprenita kiel idearo verkita en difinita epoko fare de homo, kiu vidis la fiaskon de internaciismo kaj la venenan influon de naci-ŝovinismo - povas utile fekundigi etnismon kaj doni al ĝi la tutmondan dimension, kiu unuavide mankas al ĝi.
Sekve de mia "malkovro" mi pledis en artikolo de "Sennaciulo" por tiu herezaĵo. Vane, supozeble. Ortodoksaj sennaciistoj plu kondamnas etnismon. Ortodoksaj etnistoj, kiam ili estas esperantistoj (jes, estas!) , juĝas sennaciismon baze tute erara.
Tial ege utilas, laŭ mi, la debato pri "nacio" proponita de Jakelino, kiel unua paŝo por poste esplori, ĉu vere sennaciismo estas nepre en antagonismo kun etnismo, aŭ ĉu unu povas renkonti la alian, kaj ambaŭ sin interfekundigi.
Mi bone komprenas la vidpunktojn de Suzana kaj de Johano-Luko, des pli bone se mi uzas la ŝlosilon iel liveritan de Jakelino : naciismo = naciŝtatismo, des pli ke Johano-Luko elvokas tute trafajn ekologiajn argumentojn. Sed, feliĉe, ekologio estas kompleta scienco, kiu samtempe liveras ankaŭ argumentojn favorajn al respekto de la naciecoj (= etnoj).
Sennaciismo ne devus resti tio, kion verkis Lanti komence de la jaroj '30. Etnismo ne plu parencas al la reakcia

movado, kiu okulumis al Hitler. Ĉu estas tiel hereze en nia epoko opinii ebla la tutmondan integriĝon samtempe kun plua diferenciĝo ?
En sia libro france titolita "Choisir d'être humain" (Elekti esti homo) René Dubos asertas jenon :

"La naciecoj estas riĉaĵo de la homaro ; ili estas ties kristaliĝintaj personigoj. Ilia malapero nin ĉiujn malriĉigus, kvazaŭ malriĉigus nin, se ĉiuj homoj iĝus similaj, kun sama vizaĝo kaj sama personeco". (p.177).

"En ĉiuj vivantaj sistemoj la integriĝo ĉiam kuniras kun diferenciĝo. La tutmonda sociordo, rezultonta el la integriĝo de l'socisistemoj, estos supera formo de homara unueco, akordigebla kun la plureco de vivmanieroj kaj ideologioj." (p.190).

"Ju pli la nacioj kaj regionoj de l'globo plu diferenciĝos - per siaj ekonomiaj aktivadoj, siaj sociaj strukturoj kaj siaj vivmanieroj - des pli necesos ekuzi novajn integrilojn. Tiel ili povos kune konsistigi organisman unuecon, samtempe konservante siajn individuecojn". (p.189).

Nova integrilo ? Certe, René Dubos ne pensis pri Esp-o. Sed ĉu ĝuste Esperanto ne estas unu tia integrilo ?

Resume, mi pledas por - postmorta - geedziĝo de Lanti kun Jakelino ! En nia... S(V)AT-asocio...

Kribo

La venonta temo de nia debatserio : "Kiel vivantigi esperanto-gazeton?" Bonvenas ĉies opinioj !

La verkoj de E.LANTI disponeblaj ĉe SAT-Broŝurservo:
- La laborista esperantismo, 32 paĝoj
- Vortoj de Kamarado E.Lanti, 192 paĝoj
- El Verkoj de Lanti (du volumoj),160 + 140 paĝoj
- Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio? 52 paĝoj

Speciala oferto por la ĉi-supraĵoj : 45 FF kun la afranko.

Baldaŭa reeldono : "Naciismo". Mendante la jam disponeblajn tekstojn, bonvolu eventuale informi pri via deziro ricevi "Naciismo"n, kiam ĝi estos preta. Dankon! (Tio helpos fiksi la eldonkvanton).





# VORTOJ DE MALJUNULO

valo

## F E R I A   D I A L E K T I K O

Ĉiujare mi pasigas la somermonatojn en Cevena urbeto.

Tie pasas kvar akvofluoj. En tri el ili oni povas sin bani ; en unu precipe estas du agrablaj banejoj tre proksime almonte de la urbo. La unua, ĉe la "Roko de l'Feinoj", estas ne vasta, sed tre pitoreska ; la dua estas artefarita akvebeno ; tie oni facile plonĝas, longe naĝas, boatas, praktikas diversajn akvoludojn.
De sep jardekoj mi daŭre vizitadis tiujn du banlokojn: iam kiel knabo aŭ adoleskanto, poste kun mia edzino kaj geamikoj, kiel patro kun miaj gefiloj, fine kiel avo kun miaj genepoj. Al ĉiuj mi instruis naĝadon kaj plonĝadon, en kiuj sportoj ili fariĝis pli lertaj ol mi mem.
Ĉi-jare tamen mi rezignis tien iri. Nun mi preferas marŝi du aŭ tri kilometrojn pli malproksimen por atingi alian banejon, ne tute tiel belan kiel la unua kaj malpli vastan ol la dua. Kial ? Tial ke en tiuj du, kie antaŭe la akvo estis tiel pura, ke la fundo estis klare videbla ĝis tri aŭ kvar metroj, nun ĝi estas malklara, daŭre poluata : en proksimo almonte de ĉiu estas instalita amas-tendumejo, kies defluiloj de lesivoj kaj necesejoj elverŝas senpere en la riveron (°).

Tiuj tendumejoj estas tre utilaj. Ili ebligas al multaj urbaj laboristoj vivi kelkajn tagojn aŭ semajnojn en oksigenriĉa aero, meze aŭ proksime de belaj naturaj kadroj, plene ĝui sian libertempon, malpli multekoste ol en hoteloj.
Al tiuj feriantoj kaj al aliaj estas ankaŭ utile kaj agrable sin bani en rivero el pura, nepoluita akvo.
Ho ve! jen estas du dezirindaĵoj, kiuj fariĝis rekte

interkontraŭaj. Kiel eltrovi sintezon por levi tiun dilemon ?

Ne necesas longe cerbumi : la solvo estas evidenta - kaj facile realigebla. Sufiĉas provizi ĉiun tendejon, kiel ĉiun urbon kaj ĉiun vilaĝon, per efika instalaĵo por repurigi la uzitajn akvojn.
- Sufiĉas ? Facile ? Sed kiom multekoste !
- Ja certe.
Sed tre verŝajne tio kostus malpli ol tankoj, bombaviadiloj, atombomboj, misiloj, nukleenergiaj submarŝipoj, kc. Kiom da utilaj aferoj estus efektivigeblaj per la monsumegoj dediĉataj al amasmurdaj rimedoj !
Ho ni dupiedulojn, kiel stultaj ni estas !

Valo.

(°)Fakte la akvo en la banejoj ne estas tre malklara, ĉar ĝi konstante renoviĝas per abunda rapida fluo, kaj cetere la tendumejoj havas laŭleĝajn purigrimedojn ; mi tamen dubas pri ilia plena efikeco.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

E K O L O G I O = E K O L O G I O = E K O L O G I O

La oponantoj al la plifortigado de la nuklea NATO-arsenalo (respondeculoj pri pluraj eŭropaj movadoj) kunvenis en MONTHLÉRY (Essonne, Francio) por starigi kalendaron pri venontaj manifestacioj. Estas antaŭviditaj manifestacioj ĉe la misil-instalejoj kaj en la koncernaj landaj ĉefurboj. La 11an kaj 12an de decembro okazos konferenco en Ateno pri la temo : Kiel krei sennukleajn regionojn ?

En BISCAROSSE (Landes, F) la provcentro estos perfektigita, anoncis la ministro pri defendo, okaze de sia vizito. Nun oni tie "poluras" la strategian 6-nuklekapan misilon M4. La 10an de marto la sepa pafado normale efektiviĝis.

Oriente aŭ okcidente de BORDOZO ? Kie pasigi la alttensiajn liniojn venontajn de la atomcentralo konstruata en Braud-St-Louis ? La "orienta" projekto estas kontraŭbatalata de la komunumoj de regiono "Entre-Deux-Mers", dum la koston de la "okcidenta" oni taksas tro alta kun vojo tro proksima al la pafkampo Souge kaj trairo de urba regiono inter Cubnezais kaj Castelnau. La ekologiaj movadoj ofensivis "oriente" en julio pro la penetro de EDF en tieajn bienojn...



Al la artistoj.

VANE NUR

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Kial vi serĉas min, blinduloj ?
Ĉiam vi trovos min kun ĝojo,
Transe de mensaj la nebuloj,
Fine de via vivovojo.

Migru tra l'Mondo vi sen halto :
Ĉie vi, apud monta rojo,
Trovos min helpe de ĉamsalto,
Fine de via vivovojo.

Estas mi Morto la Eterna,
Kristo sur Kruco ; ĉies ĝojo,
Stampo de Besto la Konsterna,
Fine de via vivovojo.

Estas mi Fonto de la Vivo,
Funde de morta la ripozo.
Revo iĝanta efektivo,
Lumo en plumetamorfozo.

Ondas mi lume radianta
Ĉien, senlimen, kurberekten,
Histo plasmeca en konstanta
Emo plupuren, pluperfekten.


Maro vitreca ĉieltronas
Mi, ĉar puras mi pli ol ĉio.
Dekdu steletoj min orkronas,
Ŝate sin nestas en mi Dio.

Kial vi serĉas min, blinduloj?
Ĉie min laŭdas la hobojo.
Vane nur, antaŭ homokuloj,
Stelas mi, pura plej alojo.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Eymet 1982/02/16

B.G.D.



# ĉies voĉo

("nia libera tribuno")

## R E B A T O al "LETERO EL ISRAELO"

Mi loĝas nek en Libano nek en Israelo, do mi ne travivis korpe tiun militon. Mia opinio povas sin bazi nur laŭ atestoj de personoj, kiuj, profesie aŭ sendite de asocioj, enketis pri la situacio en tiu regiono de la mondo.

Mi tute ne aprobas la terorismon, kiu frapas blinde senkulpulojn, sed tia agad-formo ofte ŝajnas al aktivuloj la nura vojo (fakte sen elirejo!) por atingi siajn celojn, kiam ne ekzistas politika solvo. Ankaŭ la Israelanoj uzis terorismon kontraŭ la angla okupado antaŭ la kreado de la israela ŝtato (agado de Irgun-grupo Stern), la Armenianoj kontraŭ la turka ŝtato por rekonigi la genocidon de 1915, la Irlandanoj, la Vaskoj, la Nacia Liberiga Fronto kaj OAS(°) dum la alĝeria milito, ktp. Terorismo estas ofte la solvo de la malespero !

Mi komprenas, ke Israelanoj volas vivi en sekureca etoso, sed ĉu tio senkulpigas la terurajn flugatakojn sur domojn, malsanulejojn, kiuj mortigis 80 % da civiluloj ? Sendube okazis detruoj en Bejruto fare de la diversaj armeoj, kiuj batalis en la urbo, sed neniam tiagrade. J. HUNTZIGER, nacia sekretario de la franca Socialista Partio, kiu partoprenis en delegacio de la Socialista Internacio, deklaris : "Oni devas diri, ke la bildoj, kiujn oni vidis en la franca televido, estas preskaŭ sub la realeco : okcidenta Bejruto estis komplete detruita. Bejruto estis la kampo de eksperimentado de novaj bombard-teknikoj, kiuj ebligas la detruon de domoj unu post la alia."
La 27an de junio la israelaj bomboj detruis intence azilon de maljunuloj kaj mensmalsanuloj. Tiu hospitalo estis centprocente libana propraĵo kaj ĉiuj religioj (inklude de la juda) estis akceptataj laŭ la deklaroj de la direktoro. Tiu azilo estis bone signalita per ruĝa kruco sur la tegmento. Franca kuracisto D-ro PARAMELLE certigas,



ke li devis flegi gravajn vunditojn pro fosforaj bomboj, kiuj estigis brulvundojn, kaj rapide amputi vunditojn pro glob-bomboj, kiuj dispartigas la homan organismon. Eble vunditoj estis transportitaj en israelajn malsanulejojn, sed ĉu ne estus preferinde ne uzi tiel terurajn armilojn ? Ĉu tio ne estas ŝtatterorismo ?

En sia tuta letero nia israela samideano ne parolas pri la palestinia problemo, kiu tamen ekzistas, eĉ se la israela registaro ne volas rekoni ĝin. Usono komencas ĝin priatenti, sendube pro diplomata taktiko, sed ĉiam, kiam oni mortigis multajn homojn kaj detruis multajn urbojn, la veraj interbatalantoj estas devigataj sidiĝi ĉirkaŭ traktad-tablo por serĉi solvon al problemoj, kiujn oni provis solvi per milito. "Neniam ni ne traktados kun la Palestinianoj de P.L.O, kiuj estas nur banditoj ! diras la israelaj registoj."
En Francio De Gaulle (Degol) diris la samon dum la alĝeria milito : "Sinjoroj murdistoj bonvolu lasi la tranĉilojn en la vestdeponejo!" Li tamen estis devigata trakti kun la veraj batalantoj. En Israelo mem malplimulta movado "La Pacon nun" manifestacias kontraŭ la libana milito kaj asertis, ke ekzistos sekureco por Israelo nur kiam estos solvita justece la palestinia problemo.
La Palestinianoj kaj ankaŭ la aliaj arabaj landoj devas kompreni, ke Israelo rajtas ekzisti. (Israelo ne kulpas sola en la nuna situacio).

Laŭ mi, paco en Proksima Oriento povos okazi, nur kiam la Palestinianoj efektive rekonos la ekziston de Israelo kaj reciproke, kiam Israelo konsentos forlasi la okupatajn teritoriojn kaj rekoni la rajton de Palestinianoj havi sian propran landon kie vivi laŭ siaj kutimoj, vivmanieroj.
Sed bedaŭrinde por atingi tiun celon necesos en la milit-tendaroj evoluo de la spiritoj kaj forlaso de la fanatikismoj.

J.G. (Francio)

(°) OAS estis terorista grupo el francaj loĝantoj en Alĝerio, kiuj ne volis konsenti la sendependiĝon de tiu lando kaj provis perforte malhelpi ĝin.

oooooooooooo

Letero de Y.P., Parizo : "Mi legis kun granda intereso ...la artikolon de p.5 en la 43a numero de Laŭte! pri Proksima Oriento. Mi miris pri la kreado de la "ligo por federacio en la proksima oriento", kaj mi ŝatus havi pluajn informojn..." Kiu povas sendi la adreson de Roll Löwenbein (la red.de "Laŭte!" ne havas ĝin) aŭ rekte tiun de tiu asocio ? Skribi al Yves PEYRAUT, 89 av.Michel Bizot, F 75012 PARIS.

Letero de G. Passarella, F 34290 SERVIAN : "Jam ok jarojn mi parolas Esperanton kaj vojaĝis en diversaj landoj, sed nur en Francio kaj de francoj mi aŭdis uzi la vorton "ci" anstataŭ "vi". Ĉu vi povas klarigi al mi tion "franca dialekto" aŭ kio estas. Ĉu oni neniam demandis la francojn pri tio eksterlande ?"
Red. : Ĉu "ci" estas uzata dialekte nur de francoj ? Legantoj mem respondu !

Sensekva polemiko - En numeroj 40, 43, 44 de Laŭte ekestis polemiko pri "anarkiismo kaj aŭtokratismo" inter mi mem kaj anonima B.G.D. La ĵus verkitaj argumentoj de B.G.D. estas tiel fantaziaj (ĉar mi deziras resti afabla...), ke ne estas eble serioze diskuti. Pro tio mi ĉesigas, pri tiu temo, daŭron de diskutado.

Yves PEYRAUT.

"Eŭropo en danĝero" -

Tio ĉi malsupre estas nek respondo nek rebato. Tia legado certigas al ni, pacamantoj, ke la plejmulto da homoj ne studis la meĥanismon de la milito kaj de la regado de la homaro. Tion, ho ve! delonge ni scias...
Ĝis kiam homoj ne plu diskutos pri iu ajn armado, armilaro, kaj ĝiaj diversaj efikoj pli-malpli teruraj..., ĝis kiam ĉiuj homoj komprenos la aĉan regadon de la homsocio fare de ĉiuj ŝtatestroj, potenculoj, la buĉado estos nepra, kaj la pacifistoj malfacile liberigos tiajn cerbojn de misinformoj.
Oni povas sin demandi kiuj estas "memiluziiĝantoj", ĉu tiuj, kiuj kalkulas pri "bona" rezulto de la militagado eĉ por la "venkintoj" (tia opinio pruvas, ke ili nenion lernis el la pasintaj buĉadoj !! - tiuj, kiuj maniĥeisme traktas la aferon - aŭ ĉu tiuj, kiuj strebas al la forigo de la armado, kiu nepre naskas militon, klarigante al la estontaj mortigitoj ĝian frenezan karakteron...

Suzanne



# la jaro 1987-a

- Unueca monda kongreso de Esperanto meze de 1987jaro -

La jaro 1987 estiĝas centjara datreveno de naskiĝo de Esperanto. De tiu dato disgardas nin kvin kalendaraj jaroj - se oni kalkulas ĝis la duono de antaŭcitita jaro.- tempo nek longa nek mallonga, sed ĝustatempa, por ke oni povu tiun daton plej solene festadi. La solena desegnado kaj markado de tiu dato estas ne nur nepra sed ankaŭ bezonega, kiel laŭ la sama esenco de la lingvo, kiun al ĝi donis la elpensinto de la lingvo, doktoro Zamenhof, indikante ĝin, ne nur kiel rimedon de la reciproka interkompreniĝado en la persona kaj korespondа kontakto, sed pli multe, kiel ĉiohumanecan koncepton - la koncepton de integra, universala paco sur la tera globo, la koncepton de homeco kaj homeca solidareco.
Tiun ĉi koncepton D-ro Zamenhof tuj en komenco forte eldiris en la unua universala kongreso de E en Bulonjo-ĉe-Maro en 1905, vorte : "Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-ĉe-Maro kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj!" Kvankam de tiu tempo pasis 70 jaroj, la penso de D-ro Zamenhof perdis de sia aktualeco nenian valoron. Spite, ĝia aktualeco pligrandiĝis, se konsidere al la nuna stato de veneniteco inter la homoj, ilia divideco en blokoj, febra armado, minaco de tria mondmilito kaj uzado de atoma armilaro.

Universitata profesoro d-ro Ivo Lapenna, el Londono, estas la unua kaj ĝis nun la sola en la esperanta mondo, kiu profunde sentis la bezonon de tiu festado, tio estas festigi solene la daton de naskiĝo de la lingvo Esp-o, kiel de la vidpunkto de la E-movado mem, tiel, kio estas pli grava, de la vidpunkto de la humaneca vizio kaj filantropio. Dokumentaron de tiu festado D-ro Lapenna ellaboris detale kaj ĝi estas aldonita kiel anekso al la ĉi-jara januara-februara ekzemplero de revuo "Horizonto" n-ro 37:1/82. La alvoko koncernas ĉiujn esperantistojn kaj E-organizaĵojn, sed memkompreneble, speciale la organizaĵojn UEA, SAT kaj NEM. La du lastaj elkreskis de

la unua - la dua ekde 1921, la tria 1959. Oni ofte opinias, ke inter ili ekzistas nenia kontakto kaj unueco kaj ke ili ne estas kapablaj preni sur siaj ŝultroj tiel pezan taskon. En 1970, dum la 43a SAT-kongreso en Aŭgsburgo - FRG - ĉeestis UEA-anoj, inter ili D-ro Lapenna mem. Do, la kontakto realiĝis kaj inter unua kaj tria estas sur la vojo de plenumado. Cetere, ili ĉiuj devenas de la sama trunko kaj ostocerbo kaj konfesas la saman fundamentan instruon, kiun inaŭguris fondinto de la esperanta ideo D-ro Zamenhof en sia verko "Fundamento de Esperanto".

La tuta jaro 1987 estos proklamita kiel Zamenhofa Jaro. Laŭ la propono de D-ro Lapenna, devas esti tuj, nepre formita internacia komitato kun celo organizi la memorigon de la datrevena jaro kun nomo Internacia Organiza Komitato por la Esperanto-Jaro 1987. Ĝi devas esti formita kaj eklabori ĉi-jare, plej malfrue estontjare. La unua sfero de laboro konsistos el sep punktoj, interalie el akcepto de Deklaracio kaj Alvoko al la mondo okaze de la Esperanto-Jaro, Baza Agadprogramo, iniciato de formiĝo de Internacia Patrona Komitato (nur eminentuloj), ktp.

Multaj el ni maljunaj kaj malnovaj esperantistoj-jubileanoj ne havos la okazon ĝisvivi la feliĉan Zamenhof-Jaron, en kiu triumfos la centjara datreveno de naskiĝo kaj ekzistado de Esperanto, la liberigita konscio kaj konscienco de homaro. Sed tio ne gravas. Grave estas, ke ne plu ekzistos kiel realeco, sed nur kiel vortaraj kaj enciklopediaj perceptoj : militoj, sklaveco, koloniismo kaj pliaj institucioj, kiuj humiligas la dignon kaj ekzistadon de homo unuope kaj de la homaro kiel tuteco.

Antaŭen, al la renkontiĝo de Zamenhofa Jaro !

D-ro Dragan Dimitrijeviĉ Russchitty

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Recenzo : Bakunin - Elekto de tekstoj (1867-1873)

(Ĵus eldonita de SAT-Broŝurservo)

Oni unue rimarkas la datojn : ĉu tiaj tekstoj, de antaŭ pli ol plena jarcento, ankoraŭ konservas ian aktualan valoron kaj intereson ? Sed oni legu senantaŭjuĝe... kaj oni baldaŭ konstatos, ke ili neniel malmodiĝis - male !



# BAKUNIN



## ELEKTO DE TEKSTOJ [1867-1873]

Esperantigo : D/C.

En tiuj paĝoj estas pritraktataj tre diversaj temoj: libereco individua kaj socia, ĝiaj rilatoj kun ŝtato, patrio, naciismo ; sindikata burokratismo, balotado, "popola ŝtato", leĝoj, heredrajto, familio, kultoj,

asocioj, komunumoj. Pluraj el tiuj temoj ne nur konservis intereson, sed eĉ akiris en la nuna tempo pli freŝan kaj akutan aktualecon. Ĉiuj estas observataj el la vidpunkto de memstara, ege klara inteligento. Oni rimarkos interalie tre originalan kritikon pri la filozofio de JJ.Rousseau.

Ĉu ĉiuj tiuj tezoj estas senkritike akceptendaj ? Tia certe ne estis la deziro de Bakunin mem. Sed ili enhavas riĉan minon da ideoj meditindaj, studindaj, diskutindaj. Pri ĉiu levita demando, ĉiu leganto strebu fari al si propran opinion. Ĉiaokaze li konstatos, ke Bakunin estis kaj restas unu el la gigantoj de la libera penso.

Valo.

°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°

## "EŬROPO EN DANĜERO"

°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°

Noto de la red.: La ĉi-posta letero akompanis la artikolon aperintan p.20/22 de Laŭte n-ro 44. Ĝi tiel similas plian artikolon, ke, kun la konsento de la verkinto, ni aperigas ĝin ĉi-numere.

"...La (ĉi-kuna) artikolo pretendas respondi al samtitola artikolo aperinta en n°40a de LAŭte. LAŭTE estas sendependa revuo, kie aperas liberaj artikoloj, kaj vi pravis aperigi la ĉi-supre aluditan artikolon, eĉ se legante ĝin, mia sango bolis(°). Por mi la afero estas klara : loko de kie oni ne povas eliri estas prizono : Sovetio estas prizono. Prezenti simetrie Sovetion kaj Usonon estas trompaĵo : de Usono malkontentulo povas libere foriri. Plie, Sovetio estas ekspansiema, kaj ne kaŝas tion. Oni ĵetis nin en 1939a por "lukti por libereco" diris niaj tiamaj regantoj. Post la milito,Pollando, Ĉeĥoslovakio, Rumanio, Bulgario, Hungario kaj la duono de Germanio falis en prizonon. De tiam Sovetio ankoraŭ strebas gajni teritoriojn por pligrandigi la prizonon. Mi mem estis 6 jarojn mallibera : unu jaron mi estis soldato kaj 5 jarojn militkaptito ; mi scias kio estas mallibereco : ĝi estas la plej aĉa situacio. Tion atestas nun la Afganoj kaj la vjetnamaj "boat-peoples", tion atestis la ribeloj en Berlino, Budapesto, Prago kaj la amasaj forfuĝintoj

(daŭrigo p.35)

--------

(°) Por la harfendemuloj, legantoj de "Lingvaj Anguloj", jen specimeno de "absoluta participo" por via kolekto. Kiu ne pekis, tiu unua ĵetu la ŝtonon... (Red).



## TRA LA MONDO
per biciklo kaj esperanto.

*************************

Hindoĉinio, 1931.

Ofte en la vilaĝoj mi renkontas sanitarejojn kreitajn de francoj. Bedaŭrinde, en 1931, ĉiuj estas forlasitaj. Mi trovos unu en iama templo, iniciate malfermitan de juna anama sanitaristo kaj dek liberolaj helpantoj. "Ĉiuvespere - li diris - mi disdonas sobran manĝon al ĉ. 2 000 malsategantoj. La plej urĝajn malsanulojn mi sendas al indiĝena hospitalo en VINH." Je la 12a li invitas min partopreni en lia manĝo ĉiutage sendata de lia patrino : duonacida bovlo da rizo kun saŭco el salita kaj fermentita fiŝaĵo, kaj viandpecetoj ankaŭ salitaj. La malsategantoj ricevas nur bovlon da rizo kun teo. La rizon liveras la Ĝenerala Rezidejo, kvankam nesufiĉe. Male, ĉie mi renkontas tabakejojn kaj trinkejojn. El tio rezultas, ke ĉiu renkontita franco diras al mi : "Por sin obeigi, nur unu rimedo, skurĝo." Kompreneble, prostituo estas alia natura sekvo de tia situacio. En hotelo servisto prezentas al mi du tarifojn : unu por la menuo, kaj alian kun fotoj de virinoj, kies prezo varias laŭ la raso. Kion fari kontraŭ tio ? La homamaj iniciatoj de kelkaj el miaj samlandanoj plej klarvidaj estas forbalaitaj de ĝenerala senkonscienco.

Okazo ebligas, ke mi vizitas ĵuskonstruitan tombomonumenton de la lasta anama imperiestro. El ferbetono, ĝia interno estas lukse dekoraciita per donacoj de koloniaj eminentuloj, kiel subskriboj atestas. Sed vane oni serĉas postsopiran ateston de liaj samregnanoj.

Tiun saman tagon priesperanta konferenco vekas entuziasmon kaj intereson de enlandaj eminentuloj.

Septembro 1931.

Estas la pluvsezono. Mia antaŭenirado fariĝas peniga. Regas malagrabla humideco, ĉien penetranta. En kelkaj horoj ĝi povas tegi objekton per ŝimo persista kaj malbonodora.

Mardon la 30an de septembro 1931.

Vespere, ĉirkaŭ la 8a, forveturo aŭtobuse de PHAN-LAN al DALAT. Lunbrilas superbele. Sekve, la vojiro estas vere agrabla vojaĝo, spicita de tri notindaj incidentoj. La unua estas

pneŭa krevo. Je la 23a ni trovas kamionon haltigitan de du arbegoj falintaj laŭlarĝe de la vojo. Du montaranoj pene klopodas ilin senbranĉigi per siaj plataj tranĉilegoj. Tiel necesos almenaŭ la tuta nokto. Tiam mi memoras, ke mi estas ĉarpentisto, do arbohakisto. Oni donas al mi la helphakilon de la aŭtobuso kaj... kvaronhoron poste, kun helpo de la miregigita ĉeestantaro, la vojo estas libera. Kelkajn kilometrojn pli fore, dika roko baras la vojon. Ni sukcesas transpasi koste de vera akrobataĵo fare de la ŝoforo. Finfine, je la 4a matene ni alvenas en DALAT ĉiam akompanataj de la lunbrilo. Sed neniu hotelo por dormi. Mi do starigas mian tendon sub lerneja ŝirmkorto, kie mi estas vorata de kuloj kaj ne malmulte frostita, ĉar eĉ je la tropiko la montaraj noktoj estas malvarmaj.

La 4an de oktobro 1931.

Post dudeko da kilometroj inter rizejoj mi retrovas arbokovritan montaron. Denove aperas la praarbaro, kiu min akompanos ĝis Sajgono, alterne kun zonoj kaŭĉukarbe plantitaj. Je la vespero mi haltas en vilaĝeta gastejo ĉe landlimo inter Koĉinĉinio kaj Anamo, meze de la arbaro. Kelkaj indiĝenoj estas drinkantaj aĉan brandon. Post kelkaj boteloj okazas kio antaŭvidebla. Unu el ili falas, mortige ebria. Lia edzino vane klopodas lin savi. Tiam ŝi gestpetegas mian helpon. Kion fari ? Mi funde esploras mian memoron. Tiam mi pistas lignokarbon, kiun mi diluas en grandan glason da bolita akvo. Mi trinkas gluton da tiu "kafo" por montri ĝian nedanĝerecon, antaŭ ol prezenti ĝin al la malsanulo. La efiko estas tuja kaj drasta. Li abunde vomas kaj ekdormas profunde. Tiam tiuj simpluloj dankeme kurbiĝas antaŭ mi unu post la alia. La malsanulo mem ĉirkaŭ noktomezo vekiĝis tute resaviĝinta, kaj venis genue min danki, kun la manoj kunigitaj antaŭ lia kapo.

Tiu okazaĵo montras kio povus esti la vera prestiĝo de blankulo. Bedaŭrinde alkoholejoj kaj tabakejoj estas pli multnombraj ol dispensarioj kaj lernejoj.

La leganto ne kredu, ke oni improvizas tian vojaĝon. Mi rapide komprenis, ke necesas ĝenerala nocioj pri praktika higieno, eĉ pri medicino. Mi havis elementan



medicinaĵujon kaj memorlibreton:"Mia kuracado per akvo" de KNEIPP, el kiu ĉiutage mi ĉerpis saĝajn kaj praktikajn konsilojn pri korpa kaj mensa higieno. Ĝi resumiĝas per "vivu nature". Pura akvo kaj aero, suno estas la tri plej bonaj kuraciloj, hodiaŭ tiom neglektitaj. La kvara estas la homo mem, kiu devus racie uzi tiujn tri bazelementojn.

La 16an de oktobro 1931.

Mi alvenis en Sajgono, kie mi restis du monatojn, grave malsana. Ne tute resaniĝinte, mi daŭrigis mian vojaĝon. Mi vizitis Angkortemplon, Siamon, Malajajn ŝtatojn, kun halto en Sumatro kaj fine mi traveturis la tutan insulon Javo. Mi deziris iri en Aŭstralion, sed ne eblis al mi ricevi vizon ; same por iri en Usonon. Krome miaj monrimedoj ne sufiĉis por pago de martransportoj plus tre kostaj garantioj.

Mi do reveturis al Francio. Ŝipvojaĝo kondukis min de Javo ĝis Vladivostoko tra Japanio. Mia ŝparaĵo lasita en Vladivostoko kaj vendo de la biciklo ebligis pagi trajnvojaĝon ĝis Parizo. Tie mi aĉetis ne plu novan biciklon per mono pruntedonita de amiko kaj, en julio 1932, mi estis hejme.

Tagon post mia reveno mi grave vundis min en laborakcidento, kio tute renversis miajn projektojn, interalie kompiladon de ĉi tiu rakonto. Tio klarigas malfruon de la publikigo de tiu manuskripto.

Alfa-Beta. Liburno, la 14an de majo 1970.

**************

Noto de la red. : La publikigo de ekstraktoj el tiu ampleksa manuskripto (trideko da kajeroj) komenciĝis per suplemento 44-paĝa de "La Juna Penso" en 1974, poste reeldonita de SAT-broŝurservo. Restas disponeblaj kelkaj ekzempleroj sed ili verŝajne baldaŭ estos elĉerpitaj.
Ekde 1978 aliaj ekstraktoj aperis felietone en "Laŭte!" de la numero 10 ĝis la nuna 44a numero. Sume 71 paĝoj.
De januaro 1982 alian serion publikigas la revuo MONATO.
Kopion de la tuta manuskriptaro (en la franca) kaj diversajn dokumentojn pri sia vojaĝo donacis la verkinto, Kdo Lucien Péraire, al Esperanto-Rondo de Aĝenio, kiu iniciatis la publikigon. Al li nian dankon kaj niajn gratulojn !

## L A N U B E T O
## K A J L A I N F A N O J

La Nubeto multe amis la infanojn ; li trovis ilin tre amuzaj.
Iam, dum li promenis, li ekvidis etulojn, kiuj petolis en publika ĝardeno. Li deziris kuniĝi al ili. Liaj amikoj, maljunaj, grizaj kaj tute tremetantaj sekvis lin. Tuj kiam la gepatroj ekvidis ilin, ili vokis siajn infanojn, ke ili ordigu siajn aĵojn por hejmeniri. La Nubeto estis tre seniluziigita kaj ĵuris al si eliri sola por retrovi la infanojn, iun tagon, kiam brilos la suno !

Kelkajn tagojn poste, li havis la okazon eskapi. Li povis tute laŭplaĉe rigardadi la infanojn, kiuj sin amuzis, konstruante sablokastelojn, kurante post sian pilkon, ludante kun rulringo. La knabinoj ŝnursaltis kaj, ĉe la karuselo, rajdantaj knaboj ridis kaj sin reciproke heis. Kiom agrable estis !
Sed subite ŝanĝiĝis la vetero... Ej jes! Vi divenas!... La maljunaj nuboj grizaj kaj tremetantaj venis serĉe al la blanka Nubeto! Adiaŭ, ridoj kaj ludoj!... Tre rapide la panjoj arigis siajn infanojn kaj foriris.

Kaj ankaŭ li, la blanka Nubeto, devis foriri, sed li ĵuris al si, ke li revenos.

J.P.Hennebois.

### N a s r u d i n

Nasrudin disĵetis panerojn en la domo.
"Kial vi faras tion ?", iu demandis.
"Kontraŭ elefantoj".
"Sed tie ĉi elefantoj ne ekzistas."
"Do la rimedo efikas, ĉu ne ?"

Kris Long.



Paulette BASCOU
21 rue de l'Esperanto
F 07000 PRIVAS

## PERKORESPONDA KURSO

"Natura metodo" -- Mia unua eksperimento --

Post du leteroj en franca lingvo por konatiĝi kun mia korespondanto,

I - la 15an de aprilo 1980, mi sendis KASEDON, en kiu mi registris la tekston de mia unua letero, mallonga, tre simpla, kune kun franclingvaj konsiloj por uzi ĝin. Jen la traduko el la franca : "Ne provu tuj kompreni la UNUAN PARTON de la registraĵo. Unue alkutimiĝu al la ritmo, la muziko de la lingvo. Tiucele, 4 aŭ 5 sinsekvajn fojojn, plurajn momentojn en la tago, penetriĝu de ĝi, PASIVE, kiam ci faras ion ajn, sen streĉa atento. Ci penetriĝos de la ritmo de la frazoj, de la akcento. Ci rekonos kaj memoros vorton, esprimon, frazon... Ne gravas, ke ci ne divenas la signifon de kelkaj vortoj ; la ĉefaĵo estas, ke ci alkutimiĝu al la MUZIKO de la lingvo. Tio estas lernado laŭ natura procezo, same kiel infano lernas sian patrinan lingvon, unue pasive kaj aŭde. Tio estas la plej bona rimedo por atingi sen peno, kaj certe, perfektajn prononcon kaj akcenton. Poste, sed nur poste, daŭrigu la aŭskultadon de la DUA PARTO, registrita frazon post frazo, apartigita de silento. Atente ĉiun aŭskultu, kaj provu ripeti ĝin, fidante nur al cia orelo. Eventuale - kiam tio al ci plaĉas - ci povas samtempe registri cian prononcon per alia magnetofono, por kompari la du esprimmanierojn."

II - Post 2 aŭ 3 tagoj, mi sendis duoblan leteron (unu por ĉiu el ni). La letero estas skribita tre legeble, kun unu linio malplena inter ĉiu skribita linio, kaj aldonas aliajn konsilojn :
"Je la ricevo de tiu skribita letero, uzi denove la magnetofonon,
- okule legi la leteron, aŭskultante SAMTEMPE,
- provi kompreni la tekston, malkovri la ĝeneralan signifon,
- dum nova aŭskulto, noti nekonatajn vortojn, kaj la malkovrojn lingvajn,

- dum la dua parto, dum la silentoj, ripeti la frazojn legante la tekston."

III - La korespondanto sendas al mi tri specojn de slipoj :
  1 - La tradukon de mia letero, sur la tiucelaj liberaj linioj,
  2 - En la vertikala duono de alia folio, li notas MALKOVROJN kaj DEMANDOJN. Jen la unuaj : (inter krampoj la korespondanto citas vortojn de la letero)
    " - IN indikas inan formon, ET malgrandecon (FILETO), do mi rajtas diri : HUNDETO, KATETO, KATINETO.
    - la posesivajn adjektivojn oni havigas per A je la fino de la personaj pronomoj : MIA, CIA, LIA, NIA...
    - T indikas montran pronomon, K demandan aŭ relativan pronomon : (KIOMA, KIU, KIUN).
    - ĈU demandas kion esprimas la frazo.
    - mi hezitas por ANKAŬ : ĉu "aŭ" estus sufikso por la tempo ? (baldaŭ, hodiaŭ)
    - kial JARaĝa, kaj ne monataĝa ?
    - kiel diri "mensuel" ?
  3 - Sian propran duoblan leteron, li skribas en esperanto, lasante unu linion malplena kaj skribante france la vortojn nekonatajn.
  4 - Franclingvan leteron por necesaj klarigoj.

IV - Mi sendis :
  - la sekvantan leteron, uzotan kiel la unua.
  - lian korektitan leteron.
  - ĝian registraĵon por ke la korespondanto rediru ĝin al mi voĉe. Sufiĉe rapide li ne plu bezonis tiun "modelon". Li mem baziĝas sur la registraĵo de mia propra letero, por bone prononci, akcenti la legadon de la sia. Iom post iom, ekde la 5a letero, li sentis sin sufiĉe lerta por REKTE registri mesaĝon paralele kun niaj skribitaj interŝanĝoj, aliateme.

Post tri slipoj, ni resumis la konataĵojn ; ni grupigis ilin :
- Personaj pronomoj - posesivaj adjektivoj - konjugacio - participoj aktivaj, pasivaj - sufiksoj : ET, EG, IN, AR, EJ, ON, AD, EC - prefiksoj : MAL (mallonga), RE (resendi) GE (gefiloj), EK (ekscii) -



Rilataj vortoj : AL, EN, KUN, SED, PER, POR, PRO.
Korelativoj nedifinaj : IU - IOM (mi iom konas vin)
Relativaj, demandaj: KIU (letero, kiu multe interesas min) - KIUN (foto, kiun mi resendis) - KIO, KION (Kion faris la knabo ?) - KIE, KIA, KIOM, KIAM, KIEL (facile ci rakontis...)
Demonstrativoj : TIO
Kolektivaj : ĈIUJ (ĉiuj linioj), ĈIAM (kiam), ĈIE (kie)
Kunmetitaj vortoj : (vent-muel-ej-o, vent-muel-il-o)

Dum tiu korespondado, mi konatiĝis kun la kvar familianoj, kiuj ankaŭ skribas al mi ESPERANTE, eĉ la sepjara filineto, kiu sendas desegnojn kaj parolas en la magnetofono !
Ni komencis la interŝanĝojn la 14an de aprilo 1980 ; jen eltiraĵoj de letero de Edith kaj "poemon" de Daniel, la 5an de aŭgusto 1980 !

"Ni marŝis en arbaro. Ni iris al "Creux du Vent" en Svislando, dum vespero por vidi sovaĝkaprojn. Ni vidis du sovaĝkaprojn apud ni. La du sovaĝkaproj ne timas. Ili promenas en paŝtejo, manĝas arbfoliojn, flankrigardas nin, grimpas sur la rokplenajn vandojn. Ili saltas de roko ĝis roko.
Iliaj grandaj kornoj sur la kapo siluetiĝas en la vespera brumo. Malgraŭ la malbona vetero, la pluvo kaj la vento, ni povis vidi akvofalojn kaj "Le Saut du Doubs", akvofalon de "Beaumes les Messieurs".
Ni bone restadis en Métabief kaj en La Chaux de Fonds.
Ĝis baldaŭ..."

"V E N T O

La vento blovegas.
Ĝi dancigas la lupolojn.
La poploj kaj salikoj riverencas.
La tritikoj kaj la hordeoj ondmoviĝas.
La ventmuelejoj turnigas siajn brakojn
    Pli kaj pli rapide.
La tuĥoj, penditaj en la ĝardenoj, plaŭdas.
La biciklantoj mallevas la kapon,
La pedaloj rezistas, la biciklo zigzagas.

La nuboj kuras en la hela ĉielo
De preĝeja turo ĝis belfrido.

De tempo al tempo, la suno okulsignas
Inter la nuboj kaj gajaspektigas la pejzaĝon.

Vento el ŭesto (°)
Vento de Flandro,
Vento kvietiĝu,
Por ke ni promenu."

(°)neologismo

La filo NICOLAS skribis la 27an de septembro 1980 :
"Mi ludas (per) mia biciklo kaj mia balono. Mi falis dufoje sur la gruzetoj. Mi promenis (en) la kamparo. Mia fratino kaj mi ludas kun mia kamarado Kristoforo."
(Nicolas estis 10-jara)

Ĉi-jaron, la 4 familianoj veturas al CEGLED en Hungario por partopreni en la ICEM-Renkonto 16-29 de julio 1982. La klaso de Daniel korespondas kun lernejoj en Polio kaj Peruo. Li interesege skribas la Bulgaro kaj ili vizitos korespondantinon en Rumanio.

Ĉu natura metodo valoras ?

Kiu ankaŭ respondos en "Laŭte!" al Kurt Schut ?

P.B.

°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°°

Libroservo de Amika E-Rondo Aĝenia (tiu ĉi listo nuligas tiun aperintan en la n-ro 42 de "Laŭte!") :

| | |
|---|---|
| Absolutismo (Lanti) | 3. |
| Cours Rationnel (broŝ.) | 40. |
| ,, (bind.) | 45. |
| Kasedo por tiu kurslibro | 35. |
| Dictionnaire pratique | 60. |
| Dictionnaire de poche | 15. |
| Esp-a Mozaiko (Faulhaber) | 16. |
| "Esperanto,volontiers!" (9 glumarkoj Ø 32 mm) | 2,5 |
| Falsaj amikoj en Esp-o | 4,5 |
| Forto de l'Vero (Adi) | 16. |
| Grand Dictionnaire E/Fr. | 70. |
| Gvidlibro de F.E.I. | 3. |
| Junulejo + La buĉejo | 10. |
| Junulkurso kun suplemento por francoj | [illegible]. |
| Diskoserio por tiu kurso | 35. |
| Kalejdoskopa Varieteo | 10. |

| | |
|---|---|
| Kiel esti amata(Brandys) | 7. |
| Liberigo de timo kaj mizero (Bellamy-asocio) | 2. |
| La varmega suno (albumo) | 6. |
| Ne tiel,sed tiel-ĉi | 27. |
| Plena vortaro | 60. |
| Skizo pri filozofio de homa digno(Gille/Lanti) | 9. |
| Tra dezerto kaj praarbaro (Sienkiewicz) | 60. |
| Tri Verkoj de Volter | 40. |
| Vojaĝo al Kazohinio | 40. |
| Vers une communication transnationale 20 ekz. | 8. |
| L'esp. au service des jeunes (100 ekz.) | 8. |

Prezoj en francaj frankoj sen afranko.



el orienta Germanio kontraŭ kiuj Sovetio konstruis la mankantan muron al sia prizono. Mi abomenas komunismon, ĉar ne nur ĝi ĉiam kaj ĉie ekonomie fiaskis, sed scias konstrui nur malliberejojn kaj ne havas eron da toleremo. Oni eble jam forgesis la civitanan militon, dum kiu la komunisma partio (en kiu jam oficis S. CARILLO kaj D. IBARRURI), sub gvidado de A. MARTY, en Albacete, amase buĉis la sindikatajn anarkiistojn, la CNT-anojn ; kaj pli proksimtempe la "Katyn-aferon", kaj la amasajn mortigojn en Kamboĝo. Krom forgesemo, alia manko estas, ke multaj homoj, bedaŭrinde, ne plu rezonas, sed resonas de kio ili aŭdis en la taga televido aŭ legis en la ĵustaga gazeto, kaj ne kapablas akiri propran opinion, krome, oni multe parolis pri gazetmoralizado, sed oni toleras, ke homoj, kiuj senhonte krude mensogis pro partiaj antaŭjuĝoj kiel LACOUTURE pri Vjetnamio aŭ Kamboĝo, daŭrigas esti gazetraportistoj.

Mi ne anas al iu anarkiisma partio (nek al iu alia), ĉar laŭ mi, la anarkiisma teorio aplikeblus nur kun idealaj homoj, sed ne kun realaj homoj : ĝi estas ideale bela, kiel estas fabelo ideale bela, sed ne havas pli da realeco. Multaj ties anoj revas kaj gurdadas frazojn kaj imagojn jam de longe arkaikiĝintaj (marksistoj ankaŭ : oni ne forgesu, ke tiuj teorioj originas de la deknaŭa jarcento, antaŭ la industria revolucio, kiun ni nun ankoraŭ travivadas). Nun, krom kooperativoj, teoria anarkiismo estas nur "an-arkaismo" (pardonon!). Kiel multaj anarkiistoj, mi tamen ankaŭ kredas, ke ju malpli da ŝtato, des pli bone ; tial anarkiismo estas al mi almenaŭ simpatia."

MANCEAU

666666666666666666666666666666666666666666666666

Via amiko estas la respondo al viaj bezonoj. Li estas via kampo, kiun vi prisemas kun amo kaj vi rikoltas kun dankemo. Li estas via tablo kaj via hejmo. Vi serĉas lin por la paco kaj vi venas al li kun via malsato. La plej bona de vi estu por via amiko... Kaj en la mildeco de via amikeco estu la rido kaj la partigo de la plezuroj. Ĉar, en la roso de la malgrandaj aĵoj la koro trovas sian freŝecon.

Kalil Gibran, tr. M.Freud.

666666666666666666666666666666666666666666666666

# kio estas «le cun» en larzako?

Certe vi ĉiuj scias, kio okazis en Larzako. Mi ne intencas rakonti al vi pri la gravaj neperfortaj luktoj, longdaŭre (10 jarojn) organizitaj de la larzakaj terkulturistoj.
"Le Cun" estas nomo (okcitana) de la loko, kiun starigis militrifuzantoj. Nun ĝi estas internacia ejo por "Esploroj kaj renkontiĝoj por alia defendo". ("cun" = kojno)
Jen kelkaj interesaj temoj debatitaj en "CUN" : militblokoj, biblio, konstruejoj, korpo-danso, popola defendo, neperforto, civitana malobeo, Pollando, malliberejo, Tria Mondo, novaj energioj (tiu sesio konstruis ventmotoron). Okazis piedmigradoj tra Larzako, ktp...

Kun Nikol' mi partoprenis en la sesio "Tria Mondo - superarmado-subkreskado" de la 8a ĝis la 14a de aŭgusto. Animis tiun sesion membroj de AMFP (Franca-palestina medicina Asocio). Ĉeestis ankaŭ eksterlandanoj; Iranano, Libanano, Marokanoj.
Ni tendumis, ni iĝis vegetaranoj kelkajn tagojn. Kaj ni forgesis nian komfortan hejman vivon. Kia plezuro por mi gustumi veran panon surloke bakitan! Ni helpis al la preparado de la manĝoj, samtempe tio ebligas kontaktojn inter la aliaj sesiaj partoprenantoj.
Se ni enuas, "le Cun" proponas al ni interesan bibliotekon, 1200 libroj estas je nia dispono, ankaŭ dokumentaro (400 dosieroj). Ĝi ricevas 60 revuojn kaj gazetojn.

Pri la sesio : ĝi estis interesa, grandvalora pro la diverseco de la multnombraj debatoj pri la Latin-Ameriko, Nikaragva, Gvatemala, Brazilia, Argentinia, Ĉilia situacioj..., nocio kaj historio pri la Tria Mondo, perfortoj, armado (ligilo inter superarmado kaj malarmado), Irano (islama revolucio), mara geografio, informservo, gazetoj, radio-televido, ktp, objektiveco, kooperado.
Kiel projekcion ni vidis "L'Arsenal" lumbildan muntaĵon pri la bien-alpropriĝado en Israelo, komentitan de libana kamarado, ktp.
Roger kaj Suzana de komunumo "L'Arche" raportis pri Argentinio. Suzana partoprenis en la fastado organizita de "Artisans de la Paix" de la 6a kaj 9a de aŭgusto (datrevenoj de resp. Hiroŝima, Nagasaki). Ŝi fastis en





Taverny, kie sidas la decidejo pri la ekfunkciigo de la franca atombombo. (Por pli da detaloj legi la artikolon en "Gardarem lo Larzac"). Pluraj atestoj riĉigis tiun sesion: unu pri Irano, sentoplena, de Iranano kaj de du junulinoj de tie revenintaj.
Kun niaj geamikoj ni parolis pri Esperanto kaj respondis iliajn demandojn. Estus interese organizi esperantan sesion en "CUN". Sed... kiuj konsentos animi tiun sesion ?
Kion vi opinias pri tio ?

Ginette.

Kris Long :

# Nasrudin

Ofte Nasrudin rajdis azenon de Persujo al Grekujo.
Li portis du korbojn da fojno, kaj hejmeniris en ili.
La doganistoj suspektis kontrabandon, sed ĉiam nenion trovis.
Post multaj jaroj doganisto renkontis lin en Egiptujo:
"Nun, majstro, vi loĝas lukse tie ĉi, kie regas nek grekoj nek persoj; do diru, kion vi kontrabandis, kiam ni nenion trovis."
"Azenojn."

---

Nasrudin serĉis ion sur la tero.
Iu demandis : "Kion vi perdis, majstro?"
"La ŝlosilon", li diris. Do ambaŭ serĉis. Post iom la alia demandis : "Kie ĝuste vi perdis ĝin?"
"En la domo."
"Do kial vi serĉas tie ĉi?"
"Ĉar estas pli da lumo."

---

La reĝo decidis, ke leĝoj ne sufiĉas. Necesas, ke oni parolu vere.
Li konstruigis pendumilon ĉe l'pordego de la urbo, kaj starigis gardistojn por kontroli ĉiujn enirantojn.
Li proklamis : "Ni ekzamenos ĉiujn. Kiu diros la veron, tiu rajtos eniri. Kiu mensogos, mortos."
Nasrudin alvenis.
"Kien vi iras?"
"Al pendumo".
"Ni ne kredas."
"Do, se mi mensogis, pendumu min!"
"Sed se ni pendumos vin, vi estos dirinta la veron!"
"Do nun vi scias, kia estas via vero."

---

La majstro aĉetis azenon. Iu diris, ke li donu tiom por manĝi ĉiun tagon. Tion li opiniis tro. Do li provis igi l'azenon manĝi malpli. Ĉiun tagon li malpli donis
Fine, kiam la azeno ricevis preskaŭ nenion, ĝi subite falis kaj mortis.
"Bedaŭrinde", la majstro diris, "se restus iomete pli da tempo antaŭ la morto, mi sukcesus vivteni ĝin per nenio."





# elarkivigita letero

" M. DECOBERT
269e Rgt d'Infanterie
24e Compagnie
70e Division
S.P. 128 - Carency(°) 26/12/1914

Karaj gepatroj,

Jen tridek ses pliaj horoj travivitaj en la tranĉeoj, sed ili efektiviĝis sub specialaj cirkonstancoj, kiujn mi tuj rakontos al vi.

Ĉifoje ni estis je dudek ses metroj de la germanaj tranĉeoj, kiujn ni bone distingis. La gvatintoj diris al ni : "Dum la lastaj tridek-ses horoj, kiujn ni travivis ĉi tie, ili eĉ ne unu fojon pafis por ne esti ĝenataj per senutila pafado!" Tio estis prudenta interkonsento inter ili kaj ni.

Dum la tago mi estis aŭdinta, ke ili alparolis nin, interŝanĝis gazetojn eĉ cigaredojn. Kredi tion mi ne volis, ĝis mi mem havos la pruvon.

Kun tagiĝo mi riskas rapidan okulumon super la tranĉeo, aŭdacigate de la ambaŭflanka trankvilo. Mi refoje rigardas, pli atente. Je mia granda miro, mi vidas Bavaron (ĉar estis ili niaj frontuloj) eliri el sia tranĉeo, iri renkonte al unu el la niaj, kiu elirinte ankaŭ el la sia, interŝanĝis gazetojn kaj fortan manpremon. Tiu okazaĵo plurfoje en la tago okazis. Alzacano troviĝanta apud ni mallonge konversaciis kun ili. Ili diris, ke ili ne plu volas pafi unu plian fojon, ke ili ĉiam estis sur la frontlinio kaj ke ili jam tediĝis. Ili avertas nin pri baldaŭa anstataŭigo fare de Prusanoj, kaj ke tiam ni estu atentaj, sed kun ili nenio timendas. Efektive, jam de kvar tagoj, je 25-metra interspaco, neniu ekpafo estis interŝanĝita.

Amikoj sinceraj plenaj ni estis ambaŭflanke, kaj kiam nia artilerio alpafis ilian linion, ni ilin kompatis. Mi ne scias, kio okazus, se ni devus alsturmi ilian tranĉeon.

-------

(°) Pas-de-Calais, 10 km-ojn okcidente de Arras.

Dum la lasta sturmo, dudeko da niaj mortintoj kuŝis je kelkaj paŝoj de iliaj tranĉeoj. Tre afable oficiro invitis nin repreni ilin, dirante, ke ni povas esti certaj. Ni rifuzis... Ili flegis niajn vunditojn, ne kaptante ilin ; unu el la niaj estis flegata dum kvin tagoj.

Kiam ekvesperis, estis la 24a, Bavaro transdonis leteron, kiun nia kapitano zorge konservas. Ĝi tekstis jene, laŭ mia memoro : "Karaj kamaradoj, morgaŭ estos Kristnasko, ni volas pacon. Vi ne estas niaj malamikoj. Ili estas sur la alia flanko (probable la angloj). Ni admiras la grandan Nacion francan. Vivu Francio, multajn salutojn, subskribis la Bavaroj, taksitaj barbaroj".

Juĝu...

La eknoktiĝo ĉesigis niajn amikajn interrilatojn kaj noktomezo proksimiĝis. Subite en la apuda proksimeco, ni aŭdis kanti en fluta kaj harmoniuma akompano. Estis la Bavaroj, kiuj festis Kristnaskon. Kia impreso ! Unuflanke kantoj religiaj, aliflanke pafado, kaj ĉio sub bela lunlumo, meze de kampoj neĝkovritaj. Kiam ili finis, ni ekhurais.

Niavice, kun komenco de la kapitano, ni ekkantis unuvoĉe "Minuit Chrétien" (solena Kristnaska kantiko), poste "Il est né le divin enfant" (populara Kristnaska kantiko). Ili nin aŭskultis, poste aplaŭdegis. Fine, tri bonege sciantaj la germanan kantis du kantikojn, ĥore kun la Bavaroj.

Se oni rakontus tion al mi, mi ne estus kredinta ĝin. Sed la faktoj vidiĝas, kaj ili okazas preskaŭ ĉie. Bedaŭrinde ili nenion utilos... "

Originala teksto ĉe Jacques Decobert, 45 av.Béziou F 64140 BILLERE, kaj traduko al germana lingvo.

---

Dankon al nia amiko J. Decobert pro tiu dokumento!

---

Nasrudin eniris la teejon kaj proklamis :
"La luno pli utilas ol la suno."
"Kial, majstro?"
"Ĉar dumnokte ni pli bezonas lumon."

Kris Long.



Abonantoj de "Laŭte!" jen plia avantaĝo por vi ! De nun, pro la nura fakto, ke vi estas L-abonanto, vi ĝuos 20% da rabato, kiam vi mendos al la broŝurservo. (Krome, se via mendo egalos aŭ superos 60 FF, vi ne pagos la afrankon). Profitu la reabon-sezonon por samtempe mendi broŝurojn ! La vendprezoj restos stabilaj ankoraŭ unu jaron ĝis fino de 1983. Poste, nepre necesos ilin plialtigi, ĉar ili jam de longe ne plu respondas la verajn kostojn.

Atentu! El kelkaj broŝuroj - ĉefe la plej malnovaj - restas nur eta provizo. Ne ĉiuj estos reeldonitaj, kaj la reeldonado de tiuj restontaj en la broŝurlisto ne okazos tuj. Jen la baldaŭ malaperontaj tekstoj. Interesatoj prefere mendu ilin plejeble frue : AD (troviĝas nun en VL1), EF, HA, HM, IA, LV, MC, MI, NA, NH, NR, PC, RS, TE, TH, TM.

Novaĵo :
BAKUNIN, "Elekto de tekstoj", Kodo EL, 10FF
Vidu la recenzon p. 24/25/26. Ofsetita.
Ĵusa reeldonaĵo : BARTELMES, "Mia Vivo", 8FF
La nova eldono entenas multe pli da poemoj, sume 90 paĝoj anstataŭ 70. La "Poemaro" estas ofsetita.

Modifo por la broŝurabonontoj (kiuj provizas per minimume 60 FF) : Ili estas nun aŭtomate ricevantoj de "Laŭte!" kaj tiel ricevas per ĝi ĉiujn novaĵojn pri la broŝurservo. (Kompreneble, se ili skribe petas ne ricevi la bultenon, ili ne ricevos ĝin trude!) Tio ja estas nur "oficialigo" de jam ekzistanta situacio : nur 2-3 BS-abonantoj ne estis ĝis nun samtempaj Laŭte-abonantoj. Resume, per, ekzemple 60 FF, ili ricevos la bultenon (18FF) dum unu jaro plus valoron de 52,50 FF per broŝuroj noveldonitaj, sen pagi afrankon. Amen. Kribo.

SAT
broŝurservo

KIE LA UTOPIO?

========(daŭrigo de p.2)=========

Kia ajn estu la maniero meti la problemon, la sistemo blokiĝas. La merkata ekonomio estas nepre implikita en labirinta nodaro. Ĉiu strebo sin liberigi el unu nodo kontribuas al plistreĉado de la aliaj. Sed la ĉefa kontraŭdiro estas tiu, kiu kontraŭmetas la eksponencialan kreskadon al la de nun jam tuŝeblaj limoj de nia ekologia sfero.

La malracia eksplautado de la naturaj riĉaĵoj, des pli detruiga, ke ĝin impulsas la armilvetkuro, endanĝerigas la naturajn ciklojn kaj eĉ la ekziston mem de la homa specio. En tiaj kondiĉoj, kiuj havas la piedojn sur la tero ? Ĉu tiuj, kiuj, kvankam ne ignorante la malfacilojn de la celŝanĝiĝo, diras, ke jam ne plu eblas perdi eĉ minuton inversigi la vaporon, aŭ tiuj, kiuj daŭre asertas sian fidon por la nuna aferstato, kaj opinias, ke ĝi senpune povas pludaŭri ? Kredi, ke la merkata ekonomio ankoraŭ longtempe kapablos funkciadi sen blokado kaj sen katastrofego,ja estas la plej alta grado de memiluziado. La homoj plenkonfuze kuras tien kaj reen serĉante elirvojon. Sed ĉio indikas, ke neniu krizelirejo ekzistas kadre de la nuntempa sistemo.

Dek ok milionoj da senlaboruloj estas registritaj ĉe la okcidentaj landoj fine de 1981, kontraŭ dek kvin milionoj en 80, do pligrandiĝo ĉ. 20% en unu jaro. Je tia ritmo, Francio atingos tri milionojn da senlaboruloj antaŭ 1985, malgraŭ la ekzorcoj de Prezidento Mitterrand.

Eĉ pli drama estas la situacio ĉe la t.n. "evoluontaj" landoj : la progres-procento estas almenaŭ 30%, kvankam unu triono de la aktiva loĝantaro jam estas ekster la labor-cirkvito kaj amasiĝas en la t.n. "ladtegolaj" antaŭurboj.

Estas neniu perspektivo pri pliboniĝo. Tute male, la demografia eksplodo, la kreskado de la neproduktivaj elspezoj, la paroksisma konkurenco, la enkonduko de novaj teknologioj, ĉio anoncas galopantan pligravigon de la senlaboreco tiom ĉe la dominantaj ŝtatoj kiom ĉe tiuj per trudo dediĉitaj al duarangaj laboroj.

Paralele, la enŝuldigo de la sateligitaj landoj sub "monperfuzo" atingas altojn kapturnigajn. Ĝin oni kalkulas per centoj da miliardoj en dolaroj. Brazilo, Argentino, Pollando, Rumanio, Jugoslavio, la plimulto el la afrikaj kaj sudamerikaj landoj laboradas unuavice por la eksportado, cele al repago de siaj ŝuldoj. Submergitaj de la deficitoj, ili kontraktas novajn pruntojn, por pagi la renton de la antaŭaj pruntoj. Necesas granda optimismo, por opinii, ke tia skafaldo de kredit-kartoj ne disfalos, kaj kun ĝi la internacia komerco !



La ĉefa minaco tamen kuŝas aliloke : same kiel trajno povas kaŝi alian, la ekonomia krizo en kiun mergiĝas la mondo maskas alian, ege pli gravan estontece, la ekologian krizon.

La absurdeco de nia civilizacio industria neniam estis elpruvita en tiel konvinka maniero, kiel en ĵusaperinta studo pri la usona nutrad-sistemo, realigita far grupo da agronomoj kaj publikigita en Vaŝingtono, novembro 81 (vidu ĉi-rilate artikolon de Robert Solé, en "Le Monde" 13-12-81). Ĝi sciigas nin, ke por ĉiu nutra kalorio konsumita de l'usonanoj, necesis foruzi mil energikaloriojn, kaj tiu energio devenas duonkvante el petrolo. Se la tuta mondo - diras la raporto - devus sin nutri laŭ la usona maniero, la petrol-rezervoj en la mondo estus elĉerpitaj en la daŭro de 13 jaroj. Sed la bilanco estas ankoraŭ pli alarma, kiam oni enkalkulas la damaĝojn suferitajn ĉe la bazo produktiva, t.e. la grundo. La raporto taksas je ses miliardoj da tunoj la perdon de plugebla grundo kaŭze de erozio pro tro intensa eksplautado de la terenoj (unutipa kultivado, mekanizado, amasa uzado de artefaritaj sterkoj) kaj ankaŭ pro la disvolviĝo de konstruaĵoj kaj vojaj retoj. La betona tajdo submergas 171 hektarojn ĉiuhore ! Aldonu la perdojn pro erozio, kaj la sumo estas 63 kvadrat-kilometroj ĉiutage englutataj, t.e. 23 000 km2 jare, la ekvivalenta areo de 3 aŭ 4 francaj departementoj. La aŭtoroj de l'enketo tute prave rajtas konkludi, ke la agrokultura sistemo usona, al kiu oni kreditas okulfrapajn atingojn, fakte estas "unu el la plej detruigaj el ĉiuj epokoj". Ni jam estas detruantaj la produktivan bazon, sur kiu fondiĝas nia nutrado. Alia specialisto pri agrokulturaj demandoj, Susan GEORGES, alvenas al similaj konkludoj. Ŝi konjektas, ke la tutmonda krizo estos la problemo n-ro 1 en la venonta jardeko.

(daŭrigo p.44)

---

Pri tiu temo, ĉe SAT-Broŝurservo : "Abundo kaj konsumsocio", de Jacques DUBOIN kaj P.V BERTHIER, 36p., 3FF.

---

Kun malfermitaj okuloj

La plimulto el la ekonomikistoj kaj politikistoj elektis forĵongli ĉi nerefuteblajn parametrojn de nia produktadsistemo. Kaj ili aŭdacas taksi utopiistoj tiujn, kiuj denuncas ilian senzorgaĉon kaj nevidemon ! Ili timu la koleron de la popoloj, kiam malfermiĝos la okuloj ! "La malfermitaj okuloj", jen ĝuste la titolo de lastaperinta libro de Marguerite YOURCENAR - ankaŭ de la lasta libro de J.DUBOIN, eldonita 30 jarojn antaŭ tiu de M. YOURCENAR. El la unua menciita ni eltiras la ĉi-sekvan parton kiu centoble pli klarigas ol la pezaj verkaĵoj de niaj d-roj "DIAFOIRUS" en ekonomiko : "Kiam mi knedas la paston - M.Yourcenar mem faras sian panon - mi pensas pri la uloj, kiuj kreskigadis la tritikon, pri la profitistoj, kiuj artefare altigis la prezon, pri la teknokratoj, kiuj ruinigis la kvaliton, - ne tial ke la ĵusaj teknikoj estas nepre iu malbono-, sed tial, ke ili metis sin en la servo de avideco, kio ja estas malbono.."

Tiu nobla ino, kiun oni prave povus nomi "la Patrino Saĝo de la okcidenta mondo" montras la pusoplenan vundon de nia societo, "la abomenan ekspluatadon de la Scienco profite al avideco kaj perforto..." Kiel eblus ne konsenti pri ŝia averto kaj opinioj : "La nun minacantaj danĝeroj estas tujaj, fizikaj, kaj reduktas al preskaŭ nenio la ideologiajn konfliktojn. Se la homoj pluvivos - kio ne estas certa - oni povus revi pri ia postindustria socio, t.e. kiu utiligus el la teknikoj nur la nemalhaveblan minimumon, societo post-kapitalista, sed ankaŭ post-komunista."

Marguerite Yourcenar tute pravas. Revi ni devas. Sed duspecaj estas la utopioj : la kreivaj, novigaj utopioj, kaj la utopioj paseismaj kaj degenerigaj, kies karakterizo estas la neebleco eliri el la rutinaj vojoj, el la sklerozaj skemoj. Nu, la mondo troviĝas ĉe turnpunkto, kie ĝi plejurĝe bezonas la unuajn, por sin adapti al novaj defioj, por difini novajn normojn, por pluvivi. Ni tutfirme estas la aprobantoj de la kreiva imago, kun BERGSON, TEILHARD DE CHARDIN, Edgar MORIN, Ernst BLOCH, MARCUSE, MANNHEIM, tiu filozofo el la jaroj 20-aj, kiu eksiĝis el marksismo kaj atribuas la decidan rolon historian al iu minoritato transcendanta la sociajn klasojn, la "inteligento sen ligiloj". Niaj pozicioj ne plu estas izolitaj. Iu artikolo, publikigita de Paul VIDONNE, titolas : "Krizo de la merkata socializado". Resume, ni diru, ke li situas sur sama ondolongo kun niaj analizoj, kiel montras ĉi eltiro :



# Maljunulo rakontas

Dum milito - kion certege neniu popolo deziras - la soldatoj de ĉiu tendaro scias nur du gravajn taskojn:
1) murdpafi ĉiun, por ne esti mem mortpafita, kaj...
2) ŝteli ĉion, kio estas ŝtelebla.
Tio ĉi memorigas al mi jenan anekdoton...

Iun tagon, malamika taĉmento militista komencis invadi nian urbon. Trakurante la stratojn, la popolo angore kriis : "La sovaĝuloj alvenas!... La sovaĝuloj alvenas!..."
Ekzistas etburĝoj, ekzemple bakisto, kiuj ne povas forkuri kun siaj havaĵoj sur la dorso... Aŭdante tiujn kriojn, la bakistin^ saltis el sia butiko, kaj, kun siaj pugnoj ĉe la koksoj, ŝi voĉegis :
"Mi volus vidi homon, kiu volus kontraŭi min!..."

Kiam ŝi ĵus finis kriegi tiun liberigitan senton de sia koro, tanko alvenis. Ĝia kondukisto, vidante inon tiel grasan kaj tiel belaspektan, per forta mano ŝin levis en sian tankon... kaj malaperis en la somera polvo.

Eliris la bakisto kaj malgaje plendis : "Kompatinda sovaĝulo!..."

-nn-

loketo, kie povas rebati ĉiu feministino, post legado de la ĉi-supra afero : ____________
____________

KIE LA UTOPIO ? (fino)

"La nuna krizo estas nek simpla krizo pri reĝustigo, kiel povis esti tiuj de la 19a jc., nek krizo en la maniero reguli la ekonomion, kiel estis la granda krizo antaŭmilita ; temas, miaopinie, pri la komenco de krizo en la formo merkata mem, kiu devenas de la nekapableco de la socializado komerca pludaŭrigi la socian funkciadon." Ja ŝajnas al ni, ke la prognozo de P.Vidonne, same kiel tiu de M.Yourcenar, ĝisfunde traktas la aferon.

elfrancigis Jan BOTSO

## RESPONDAS GISELLA

AL H. ELIK :

En la itala, ekzistas la karesaj sufiksoj -uĉjo, -ino, -eto (esprimantaj diversajn nuancojn). De kie devenas la ĉ de la Zamenhofa sufikso -ĉjo ?
Ni komparu:"gattina"(it.) ="katinjo" (E.)
"gattuĉĉio"(it.) = "katuĉjo" (E.)
kaj se vi rigardas la Plenan Analizan Gramatikon, vi trovas proponitaj la "pli rekoneblajn" sufiksojn "-uĉjo" kaj "-injo" (§415, ĉjo,njo). Cetere, kvankam logika, la sufikso iĉ suferos pro manko de lingva deveno kaj pro troa simileco al iĝ.
-uĉo, tute male, povus suferi pro manko de rimoj, tiel malofte ĝi uzatas en Esperanto!
Sed mi proponus la neologismojn "duĉo" (latine, dux) = superreganta uĉo en besta grego aŭ bando, kaj "fuĉo" (latine, fucus) = uĉo de abeloj, vespoj, ktp, kies unika celo estas la fekundigo je l'reĝino. Ambaŭ vortoj, laŭ mi, ebligas diversajn komparojn...

Pri GE, laŭ mia sperto ĝi ne estas eliminebla, unue, ĉar la uzo de uĉ ne povas esti deviga, sed nur strikte laŭbezona (alie oni devus forĵeti la tutan verkaron en Esp.!), due, ĉar ĝia vera signifo estas la biologia kuneco de paro (aŭ grupo).

Pri ĴI, mi tre ŝatis la proponon de M. Challulau, eĉ provis uzi ĝin entuziasme... sed poste min trafis la ideo, ke ĵi, kvankam tre taŭga, estas tamen personpronomo... kiu ne troviĝas en la Fundamento ; tie oni klare limigas la nombron de la person-pronomoj : dek, kaj ne pliaj. Sed Esperanto estas aglutina lingvo, kaj oni ĉiam rajtas kunmeti la ideojn en novajn vortojn. Nenie estas skribite, ke oni ne kunmetu la pronomojn !
Mi scias, ke jam oni proponis ŜILI aŭ LIŜI por "pronomo de nedifinita sekso", sed tiaj kunmetaĵoj, kvankam eblaj, signifus ŜI+LI, LI+ŜI, (taŭgaj por hermafroditoj aŭ almenaŭ transseksuloj) neniam ili povus signifi "ŜI-aŭ-LI", kiel FULMOTONDRO ne signifas FULMO-aŭ-TONDRO sed ambaŭ kune.
La rolon de la pronomo, kiun ni serĉas, ĝis nun ludis "LI" (por la hom(uĉ)oj) kaj ĜI(por la homidoj). Oni povus kunmeti la du en "ĜI-LI", kiu signifus "ĜI-persono" aŭ "neŭtra-LI". Kaj oni povus malkomponi la dupronomon en "Ĝ-ILI", tio estas "singulara "ili", aŭ kiel oni volas : "ĜILI" restus tamen tute regula kunmetaĵo.
Krome, oni povus kunmeti LI+ĜI kaj ŜI+ĜI por la bestoj, kiam "ĜI" estus konfuziga. (LIĜI = LI-besto, ŜIĜI= ŜI-besto aŭ ina-ĜI.)



Pri CI - ĉu vi jam provis elparoli ĝin kiel tre milda angla "th" ? La problemo ne estas nur la povra pronomo CI, sed la litero mem! "La scienco scias celi siajn celojn". Elparolu, se vi aŭdacas!

°°°

AL "LORENSUĈJO" TOMESOLI :

Dankon por la klarigo al la ne-italaj esperantistoj je la profundaj signifoj kaŝitaj en la vorto UĈILO ; efektive ĝi estas tre taŭga vorto, sed mi bedaŭrinde ne estas tiel sprita, ke mi povus eltiri uĉon de uĉilo. Mia spritaĵo konsistis nur en tio, ke mi metis la difinon de "uĉilo" en lokon, kie efektive ĝi ŝajnas la origino de UĈO, same kiel eŭnuko estas la origino de UKO.
Mi tute konsentas kun vi en la bedaŭro pri la malapero de l'lingvaĵoj kamparaj, sed ne pri la malapero de seksismaĵoj.
"Ĉar la viroj estas esence pigruloj", vi diras, oni uzas virecon kiel neŭtran genron. Ĉar ne nur la viruĉoj sed ankaŭ la virinoj estas esence pigraj (krom kelkaj esceptoj), tiu beninda pigreco, se ĝi ekzistus en la franca, igus ĝin tute forgesi la genrojn kiel senutilan balaston, kiel ekzemple jam faris la angla. Vi do ne devus paroli pri viruĉa pigreco, sed pli ĝuste pri homuĉa narcizismo : eĉ la nomoj, pronomoj, adjektivoj uĉ-genraj estas pli belaj ol la in-genraj kaj neŭtraj, kial do oni devus perdi la okazon ilin uzi ?

Gisella Marchioni.

---

ESPERANTO-GRAMOJ

Certaĵoj

Ne ĉiam grandaj pensoj
havos grandajn sencojn.

Ili-ni

Nigraj homoj
kaj juristeco ne signifas
egalecon!

C.Stykowski.

# Zamenhof-tago

en A K V I T A N I O, 1982

La ZAMENHOF-TAGO okazos dimanĉon 12an de decembro 1982 en LE FLEIX (Dordonja departemento) - plej proksima stacidomo : Ste Foy-la-Grande - de 9H30 ĝis 18H30 seninterrompe en la Urbodomo, salono "3 âges" (Tri aĝoj).

Antaŭvidita programo :

9H30 - 11H30 : Renkontiĝo inter geesperantistoj.
12H - 14H : Tagmanĝo.
14H30 - 18H30 : Publika renkontiĝo (senpaga eniro)
Varieteoj en esperanto kaj kantoj.

Por la kolektive aranĝita tagmanĝo : 30 FF por ĉiu persono.
Aliĝojn nepre sendu, preferinde kun antaŭpago de la manĝo (eblas pagi per ĉeko) antaŭ la 1a de decembro al: S-ro Henri NORMAND, Tourène, LE FLEIX, 24130 LA FORCE Tel: 57 46 23 44.

Krome, tiun tagon antaŭos internacia ekspozicio de infanaj desegnaĵoj. Tiu ĉi okazos de la 28a de novembro ĝis la 9a de decembro 1982 en la Urbodomo de LE FLEIX, salono "Tri aĝoj". Eblos viziti ĉiun posttagmezon, de 14H30 ĝis 18H30. Senpaga eniro. La inaŭgurado okazos la 27an de novembro 1982, prezide de S-ro Urbestro, kun laŭebla ĉeestado de l'regionaj elektitoj.

TULUZA SOCIETO por ESPERANTO

Pro jama apero de "Laŭte!" ne eblis informi pri invito de la Tuluza Societo viziti CORDES, en Tarn, la 17an de oktobro. "Kontraŭ ĉia atendo la vetero estis bonega dum la ekskurso en CORDES : ni promenis sub suno, ni ĝojis elkore, babilis Esperante, fotis multe... Ni rekomencos. Fine ni havis la surprizon kaj ĝojon konatiĝi kun E-istoj el DECAZEVILLE.""

"Vespera kunveno okazos mardon 9an de novembro, de 20H ĝis 22H, en "LE CLOCHER DE RODEZ", 14 place Jeanne d'Arc, en TULUZO, kie ni povos kanti, trinki, paroli, vidi komentitajn diapozitivojn kaj fotojn kaj ĉefe praktiki E-on!"
Adreso : Esperanto, 55D rue des Arcs St Cyprien, 31300 TOULOUSE. Tel: 59-05-81.



# laŭtaj informoj kaj petoj

K U R S O por P R O G R E S A N T O J

Revo de multaj homoj estas alloga moderna "kurso por progresantoj".
En ĝi estus temoj ne troveblaj en aliaj lernolibroj. Sugestaj desegnoj koncize kaj precize klarigus gramatikon, tiel nacia lingvo ne estus necesa Kial ne uzi ankaŭ kasedojn por kompletigi la instruadon ?
Ĉiu temo povus esti aparta broŝuro, por ke la profesoroj elektu la objektojn, kiuj plej plaĉus al la gelernantoj. La nombro de temoj povus kreski dum la tempodaŭro kaj kun la kunlaborado de pli kaj pli multnombraj kamaradoj ; ĉar tiu kurso estus kolektiva verko. Komuna verkado alportus kun diverseco pli da garantio pri la pedagogia valoro de la kurso.
Bonvenaj estos tiuj, kiuj deziros laŭ siaj ebloj partopreni tiun verkadon. "Laŭte!" ricevos viajn ideojn, sugestojn, proponojn kun granda dankemo.

Anoncetoj :

Deziras korespondi kun persono en Francio, interŝanĝas bk, ka. Nomo : Jana DATKOVA, Budovatelu n°879, 28002 KOLM 11, Ĉeĥoslovakio.

Serĉas mi T-ĉemizojn kun teksto pri Esperanto aŭ pli bone en esp. Se temas pri esp., ne gravas la lingvo. Kie mi povas havigi tiujn al mi ? Temu la skribaĵoj aŭ desegnaĵoj pri io ajn : kongreso, esp-lingvo,... Bonvolu sendi ĉiujn klarigojn kaj proponojn al : BERGEON J-Luko, 272 rue du faubg. St Martin, F 75010 PARIS. Dankon.

Utila adreso por tiuj, kiuj serĉas korespondamikojn : R J ZVĚŘINA, 5 května 26, 460 01 LIBEREC, Ĉeĥoslovakio, kiu publikigas "Internacia Koresponda Adresaro"n

en la kadro de pacdefenda koresponda rondeto de Revolucia sindikata movado de ĉeĥa asekurejo en Liberec. La Adresaro aperas ne regule por anoj kaj aliaj interesatoj. Abundas la adresoj, ĉefe de korespondemuloj el popoldemokratioj. La publikigo de via adreso estos senpaga.

---

KAJ VIAJ PROMESOJ,

SINJORO PREZIDENTO?

La kandidato al la prezidenteco François Mitterrand, demandite de esperantistoj, skribe promesis al ili, ke se li estos elektita, li subtenos Esperanton. Sekve al tiu promeso, multaj esperantistoj voĉdonis por li. Ili plene fidis lin !!!
Kaj nun, kiam liaj elektintoj demandas lin pri liaj intencoj por helpi la Esperanto-movadon en nia lando (kaj en Eŭropo), li respondas : "Kiel Prezidento de la franca Respubliko, mia unua devo estas subteni la francan lingvon !"
Tiel li pravigas la neplenumadon de siaj promesoj antaŭbalotaj. Evidente li tute ne komprenas, ke la disvastigado de neŭtrala lingvo utilus al la franca lingvo, protektante ĝin (same kiel multajn aliajn lingvojn) kontraŭ la konata hegemonio de la angla lingvo (brita kaj usona), kiu subpremas ĝin, arogante al si la rolon de internacia lingvo !
Ha! Se la Prezidento plenumus la promesojn de la iama kandidato !...

Daniel Luez.

---

SAT-Gejunuloj, legantoj de "Laŭte!" : ekde januaro 1983 aperos en SENNACIULO junulara paĝo sub titolo "JUNAJ VOĈOJ" Bonvolu sendi viajn kontribuaĵojn al la redaktanto de la junulara paĝo :
k-do Owen McGHEE, Jolly Woodman, Chancery Lane, BECKENHAM, Kent, Britio.

---

## E-VIVO en ĜIRONDIO

La grupo kunvenis la 28an de sept. en "Ĉies Domo" en CENON. Ni multe parolis pri :
1) nia propono por la leĝpropono : La komitato de SAT-AMIKARO konsentis kaj H.Masson jam faris komunikon en la revuo.



Dum oktobro, ĉiuj esperantistoj skribos al Pierre Joxe, la nuna prezidanto de la socialista grupo en la Nacia Asembleo, por memorigi lin pri la promeso de F.Mitterrand koncerne la leĝproponon favoran al la instruado de Esp-o en mezgradaj kaj duagradaj lernejoj.
2) Nia internacia desegno-ekspozicio : Post la ekspozicio en CENON nia grupo nun posedas la materialon. Tuj kiam respondeckomisiono zorgos pri ĝi, tiu materialo estos je dispono de ĉiuj petontoj.
3) La tre aktiva E-grupo en LE FLEIX (24-departemento) akceptos nin por la Zamenhof-tago, la 12an de decembro. (vd. p. 48).
4) CUN de Larzako : Ginette proponis, ke ni organizu sesion pri Esperanto en Larzako somere.
5) La financa bilanco : Nia kasistino klarigis al ni la elspezojn kaj la enspezojn. Ni fiksis la ĉi-jaran kotizon al la grupo : 40 FF.

Venontaj kunvenoj en Ĝirondio

La 13an de Novembro, je la 15a horo en EYSINES "Centre Culturel"
La 12an de Decembro, en LE FLEIX, dum la Zamenhof-tago.

Joël.

---

JARFINO=ABONFINO=JARFINO=ABONFINO=JARFINO=ABONFINO=JARFI

---

Por multaj el vi tiu ĉi n-ro finas la abonon al "Laŭte". Pri tio vin atentigas la mencio **fino de via abono** sur la banderolo, kiun vi tuj enkorbigis. Esploru, se ne estas tro malfrue! Se vi deziras pluricevi nian bultenon, kies venonta numero aperos komence de januaro 1983, bonvolu sendi reabonon antaŭ tiu dato.

La jarabon-kosto por 1983 : **18FF** validos ĝis fino de junio 1983. Poste ĝi estos 20FF. Tiuj, kies abono finiĝos dumjare povos pagi antaŭ tiu dato : 20FF (por 1984) plus 1,50 FF por ĉiu monato da abono ĝis decembro 1983. (Ekzemple : abonfino junio 83, pagu 20 = por 1984 = plus 1,50 x 6 = 9 (por 1983), sume 29 FF. Tiel la abonfino koincidos kun jarfino 1984, kio iel simpligos la laboron de la administranto-redaktanto-presanto-balaanto...

Antaŭdankas, via Kribo.

---

NO=ABONFINO=JARFINO=ABONFINO=JARFINO=ABONFINO=JARFINO=AB

---

la kastelnova grupo

H.ELIK S.SIRE




Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque Timbaut
Commission paritaire 58 651